

La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2023. №4



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2023. №4 (318)

La Ondo de Esperanto aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.

Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.

Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.

Eldonas kaj administras: Halina Gorecka

Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)

Paweł Fischer-Kotowski (vicedaktoro)

Peter Baláž

Stanislav Belov

István Ertl

Irina Gonĉarova

Povilas Jegorovas

Wolfgang Kirschstein

Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando

Retpoŝta adreso: laondodeesperanto@gmail.com

Retejoj: <https://esperanto-ondo.ru>, <https://sezonoj.ru>

Abontarifo por 2024

Abonanto: 15 eŭroj, 15 usonaj dolaroj, 60 zlotoj, 850 rubloj

Amiko: 30 eŭroj, 30 usonaj dolaroj, 120 zlotoj, 1700 rubloj

Patrono: 100 eŭroj, 100 usonaj dolaroj, 400 zlotoj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)

Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)

Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)

Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)

Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2023, №4 (318).

Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.

Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 31 декабря 2023 г.

© La Ondo de Esperanto, 2023

Bazaj informoj pri <i>La Ondo de Esperanto</i>	2
En ĉi tiu numero	3
Temo	5
Paweł Fischer-Kotowski. Sun Mingxiao: La Esperantisto de la Jaro 2023	6
Elektokomisiono de La Esperantisto de la Jaro 2023	7
Paweł Fischer-Kotowski. Sun Mingxiao: Pli bone altigi la valoron de nia lingvo ol simple propagandi ĝin (Intervjuo kun Sun Mingxiao)	8
Eventoj	11
Povilas Jegorovas. Litovio: Sukcesa kaj promesplena jaro 2023	12
Josip Pleadin. Komuna Zamenhofa festo de hungaroj kaj kroatoj	16
Ronald Schindler. Zamenhoffesto en Berlino	18
Peter Zilvar, Zsófia Kóródy. Zamenhof-festo kaj ne nur en la Esperanto-urbo	19
Renato Corsetti. Zamenhofa vespero en la Londona klubo	21
María Lisandra González Hurtado. Reveno al Esperantujo: kubanino en Tjumeno	22
Jordi Calafi. Zamenhof-Tago en Montrealo	24
Quintyn Bobb. Zamenhofe bankedi en Norda Karolino	25
Jatina. Vigla Esperanto-semajno en ĉina elementa lernejo	27
Lučka Lešnik. Slovenio: Zamenhof-Festo kun ĵus tradukita filmo	29
Léa Gavaille. Esperanto Festo en Tuluzo!	29
José Antonio del Barrio. Hispana Kongreso de Esperanto en varma etoso	30
Okuŭaki Toŝiomi. Centjariĝa festo de EPA en Kameoka	31
Bert Schumann. AŬTUNAS: la Esperanto-ferioj	33
Pierre Dieumegard. EDE en surstrata manifestacio tra Parizo	34
Bruno Henry. Nova iniciato: Bunta Esperanto Tago	35
Laura Brazzabeni. Premio por Itala Instituto de Esperanto	36
Ulrich Brandenburg. EMA-2023: Aŭtuna migrado sur la spuroj de Zamenhof	37
Heinz-Wilhelm Sprick. La 20a Rata Rendevuo	38
Prezidanto de UEA en Pekino	40
Paulo Sérgio Viana. La 15a kongreso en la ŝtato San-Paŭlo	41
Bruĉjo Kasini. En la urbodomo de Pizo	42
Ineke Emmelkamp. Studosemajnfinoj en Nederlando	43
Bernard Bigonnet. Koruse en Greziljono	44
Irina Gonĉarova. 1700 gastoj en la 17a Moskva Lingva Festivalo	45
Stanislav Katsko. Lingva Festivalo en Novosibirsko	46
Sergej Abramov. Lingva festivalo en Uljanovsk: Pli ol mil vizitantoj	47
Aurora Bute. Simpozio en Rumanio	48
Povilas Jegorovas. Grava kontrakto en Litovio	49
François Lo Jacomo. Konferenco de la Akademio	50
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Povilas Jegorovas honorita	51
Proteste fermota la okcidenta legacio de la Esperanta Civito	52
UEA en la Ĝenerala Konferenco de Unesko	53
Martin Schäffer. Helpo-Servo Ukrainio 2023-10-29	54
UEA invitas prelegi en IKU 2024 en Aruŝo	55
Kio estas RenKEJtiĝo?	56
Katalunio: KEJ aliĝis al la Nacia Junulara Konsilio	56
Eŭropa Kongreso de Esperanto okazos en Strasburgo	57

Halina Gorecka, Aleksander Korjenkov. Ni funebras kaj kondolencas	58
Tribuno	59
Deklaro de ELI pri la milito en Gaza	60
Kontraŭmilita, porpaca deklaro de UEA, TEJO kaj ILEI	61
Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia Tago de Homaj Rajtoj	62
Giorgio Silfer. La Universala Deklaracio pri Homaj Rajtoj 75-jara	63
Homa Solidareco por Homaj Rajtoj	64
Premio Grabowski 2023 al la teamo de <i>Militrakonto</i>	64
<i>El Popola Ĉinio</i> serĉas esperantistan redaktoron	65
Jesper Lykke Jacobsen. Deko Oficiala Aldono al la Universala Vortaro	66
Arkivo	68
Aleksander Korjenkov. Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2024	69
Aleksander Korjenkov. Pri la granda eraro de Christian Schmidt	72
Kulturo	74
Aleksander Korjenkov. Nabokov, la libero de l' spirito	75
Vladimir Nabokov. La vorto. Kristnasko. Fabelo. Razilo. Teruro. Nubo, lago, turo (Tradukis Aleksander Korjenkov, Ludmila Novikova, Vladimir Vyĉegjanin)	77
Paulo Sérgio Viana. Neforgesebla	109
Miguel Fernández. Nuntempa hispana poezio verkata de virinoj (3)	111
Wolfgang Kirschstein. Kronikisto de ĉiutaga metafiziko	119
Aperis <i>Belarta Rikolto 2023</i>	120
Tim Owen. EAB: 14 novaj libroj en 2023	121
Stanislav Belov. <i>La murdo de Roger Ackroyd</i> : leginda distraĵo (Recenzo: Agatha Christie. <i>La murdo de Roger Ackroyd</i>	124
Wolfgang Kirschstein. Virino kiu faciligas la penon vivi per sia nura ĉeesto (Recenzo: Miguel Delibes. <i>Sinjorino en ruĝo sur griza fono</i>)	125
Paŭlo Mojajevo. Brila popular-stila debuto kun forta afrika gusto (Recenzo: Klarisa. <i>Ludu kaj kantu</i>)	126
Floréal Martorell, Aleksander Korjenkov. <i>Kukoj kun fromaĝo</i> : La kvara Esperanto-albumo de ĴeLe	128
Floréal Martorell, Aleksander Korjenkov. Primitiva 2. Nova albumo de YASS	128
Floréal Martorell. La junularo de hodiaŭ: <i>La Mondanoj revenas!</i>	129
Wolfgang Kirschstein. Ne malrespektu sanktajn librojn en Danlando	130
Aleksander Korjenkov. <i>Unesko-Kuriero</i> : Kafejoj: Miksaĵo de kulturoj	131
Halina Gorecka. <i>Beletra Almanako, 2023, №47</i>	131
<i>Literatura Foiro, 2023, №325</i>	132
<i>Literatura Foiro, 2023, №326</i>	133
Literatura Konkurso "Ĥristo Gorov – Ĥrima 2024"	134
La 4a Interkultura Novelo-Konkurso kun nova temo	135
Miguel Gutiérrez Adúriz. La 75aj Belartaj Konkursoj de UEA	136
Mozaiko	138
Stanislav Belov. Ho, tiuj komputistoj	139
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj	140
Perantoj de <i>La Ondo de Esperanto</i>	141

Kovropaĝe: Aleksej Kondratjeviĉ Savrasov (1830-1897) kreis sian pentraĵon "Vintro" en 1873, antaŭ cent kvindek jaroj.



Ni direktas niajn gratulojn al nia ĉina samideano Sun Mingxiao (Semio), aktiva disvastiganto kaj instruanto de Esperanto en universitataj rondoj, iniciatinto kaj direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Zaozhuang, okaze de lia elekto kiel la Esperantisto de la jaro 2023. Tiel, tiel plu!

Sun Mingxiao: La Esperantisto de la Jaro 2023

La Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Keppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korĵenkov (2009), Katalin Kováts (2010), Dennis Keefe (2011), Peter Baláž (2012), Mark Fettes (2013), Mireille Grosjean (2014), Chuck Smith (2015), Stefan MacGill (2016), Trezoro Huang Yinbao (2017), Hori Jasuo (2018), Anna Löwenstein (2019), Fernando Maia Jr. (2020), Halina Gorecka (2021) kaj Edmund Grimley Evans (2022).

En 2023 la elektado de la Esperantisto de la Jaro okazis por la 26a fojo. Ĉi-jare 16 kandidatigantoj proponis 23 kandidatojn, al kiuj 15 elektantoj jene donis siajn voĉojn:

Sun Mingxiao (Semio) – 7 voĉoj

Stela Besenyei-Merger – 6 voĉoj

Elda Doerfler – 3 voĉoj

Sep kandidatoj ricevis po du voĉojn, kvar kandidatoj ricevis po unu voĉon.

Sun Mingxiao (Semio) estas 59-jara esperantisto el Ĉinio, kiu disvastigas la lingvon en universitataj randoj. Antaŭ dek jaroj li iniciatis Internacian Esperanto-Muzeon en la Universitato de Zaozhuang, kiu rapide fariĝis la plej granda tiutipa institucio en Azio kaj unu el la plej grandaj en la mondo, kun 26 mil ekspoziciaĵoj sur 680 kvadrataj metroj. Dum pluraj jaroj Sun Mingxiao instruis Esperanton en la sama universitato, ekde 2018 kadre de la nova kvarjara bakalaŭra programo. En 2023 li emeritiĝis en sia laboro, sed daŭre aktivas por Esperanto.

Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2023 Sun Mingxiao (Semio)!



Paweł Fischer-Kotowski
sekretario

Elektokomisiono de La Esperantisto de la Jaro 2023

Proponantoj

Marija Belošević (Kroatio): prezidantino de IKUE
Marek Blahuš (Ĉeĥio): eksestrarano de E@I, vikimediano, komputila lingvisto
Renato Corsetti (Britio): akademiano, eksprezidanto de UEA
Albert S. T. Garrido (Filipinoj/Hispanio): eksprezidanto de TEJO
Arko Gong Xiaofeng (Ĉinio): prezidanto de la ĉina sekcio de ILEI, eksa vicprezidanto de ILEI
Edmund Grimley Evans (Britio): akademiano, prezidanto de EAB
Lee Jungkee (Koreio): direktoro de Seula Esperanto-Kulturcentro
Vinko Markovo (Francio): prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT
Valentin Melnikov (Ruslando): poeto, ĵurnalisto, tradukanto, recenzisto, akademiano
Barbara Pietrzak (Pollando): radioĵurnalisto, redaktoro, akademiano
James Rezende Piton (Brazilo): tradukanto, aktivulo de Esperanto-Ligo Filatelista (ELF/AAREK), komitatano B de UEA
Sibayama Zyun'iti (Japanio): ĉefredaktoro de *La Revuo Orienta*
Chuck Smith (Usono/Germanio): kunfondinto kaj teknikestro de Amikumum
Franciska Toubale (Aŭstralio): kunlaboranto de la radio 3ZZZ
Paulo Sérgio Viana (Brazilo): tradukanto kaj preleganto
Ĉielismo Wang Tianyi (Ĉinio): prezidanto de IKEF, direktoro de Ĉina Esperanto-libro-servo, komitatano de ĈEL

Elektantoj

Peter Baláž (Slovakio): kunordiganto de E@I
Osmo Buller (Finnlando): eksa Ĝenerala Direktoro de UEA
Petr Chrdle (Ĉeĥio): posedanto de la eldonejo KAVA-PECH
Mireille Grosjean (Svislando): eksprezidanto de ILEI, prezidanto de Svisa Esperanto-Societo
Anne Jausions (Francio): eksprezidantino de OSIEK
Reza Kheir-khah (Tajvano): redaktoro de *Formoza Folio*
Katalin Kováts (Nederlando): lingvisto, metodologo, redaktoro de edukado.net, eksakademiano
Liu Haitao (Ĉinio): profesoro pri (inter)lingvistiko, akademiano
Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio): eksvicprezidanto de UEA, iniciatinto de *Unesko-Kuriero* en Esperanto
Zsófia Kóródy (Germanio): ĉefkunlaboranto de Esperanto-Centro Herzberg, prezidanto de AGEI (germana landa sekcio de ILEI), komitatano C de UEA
Alessandra Madella (Italio): vicprezidanto de ILEI
Ahmad Mamduhi (Irano): prezidanto de ILEI, prezidinto de IrEA, akademiano, tradukisto, verkisto
Tim Owen (Britio): akademiano, direktoro de EAB
Anna Ritamäki-Sjöstrand (Finnlando): prezidanto de kooperativo Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors
Roland Rotsaert (Belgio): redaktoro de *Monato* pri ekonomio

Sekretario

Paweł Fischer-Kotowski (Pollando): vicedaktoro de *La Ondo de Esperanto*

Pli bone altigi la valoron de nia lingvo ol simple propagandi ĝin

Intervjuo kun Sun Mingxiao (Semio)

Unue, bonvolu klarigi, kion signifas via Esperanto-nomo, Semio? De kie ĝi venas, kaj kial vi decidis elekti tiun nomon?

La prononco de Semio estas iom simila al tiu de mia nomo en la ĉina lingvo. Krome, Semio estas ujo (lando) de semo. Tio signifas, ke mi semas senĉese. Liu Dawei, prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, nomas mian ideon kiel tiun de semoj.

Krei Esperanto-muzeon, jen ambicia ideo kaj heroa tasko! Pro via iniciato antaŭ dek jaroj en Zaozhuang malfermiĝis Esperanto-muzeo, kiu estas inter la plej grandaj kaj gravaj en la mondo. Kiel vi sukcesis realigi tion?

Esperanto-Muzeo estas la granda temo por nia lingvo kaj mi sukcesis konvinki la ĉefestrojn de la universitato subteni nian lingvon kaj la temon. Por la muzeo ni, esperantistoj, devas memori la unuan subteninton, prof. Hu Xiaolin, iaman ĉefestron de la universitato. Post la malfermo de la muzeo venis sescent mil vizitantoj el pli ol dek landoj kaj regionoj. Inter ili la esperantistoj ne estas multaj. Sed famaj esperantistoj kiel Mireille Grosjean, eksprezidanto de ILEI, kaj d-rino Ilona Koutny vizitis la muzeon.

Kiu estas la ĉefa celgrupo de la muzeo? Ĉu ĝi unuavice prezentas la lingvon kaj movadon al neesperantistoj, aŭ ĉu ĉefe temas pri la prezento de nia historio al esperantistoj mem? Kion la vizitantoj trovas plej interesa en la muzeo?

Fakte post la decido pri konstruado de la muzeo mi sole laboras por la muzeo, sed mia laboro estis subtenata de la ĉefestro de la universitato. La celoj de la muzeo estas: unue, protekti la kulturon de nia lingvo; due, propagandi Esperanton al la socio; trie, esplori la historion de la Esperanto-movado. Inter sescent mil vizitantoj nur iom pli ol mil estis esperantistoj. Plejparto de la vizitantoj interesiĝas pri Esperanto aŭ ĝia historio.

Kiun estontecon vi vidas por (Esperanto-)muzeoj? Kiel ŝanĝiĝas ilia rolo en la reta epoko? Ĉu ili fariĝas eĉ pli bezonataj aŭ ĝuste male, necesas pli da laboro por pravigi ilian ekziston?

Ni jam havas planon transloki la muzeon de la malnova kampuso de la universitato al la nova kampuso proksima al trajna stacidomo, la nova muzeo okupos kvin mil kvadratajn metrojn. Kaj ni jam eklaboras por ciferecigi la librojn kaj gazetojn por cifereca muzeo. Por la reta epoko tiu laboro estas necesa kaj ege bezonata.



Antaŭ ses jaroj alia ĉino – Trezoro Huang Yinbao – estis proklamita Esperantisto de la Jaro. Kiel vi taksas la fortecon de la Esperanto-movado en Ĉinio? Antaŭ kiuj defioj staras nun la esperantistoj en via lando?

Ĉinio estas granda lando kun granda forteco de la Esperanto-movado. En Pekino estas Ĉina Esperanto-Ligo, *El Popola Ĉinio* kaj Ĉina Radio Internacia, en Zaozhuang estas la Esperanto-Muzeo, Esperanto-fako kun bakalaŭraj studoj, Arbara Parko de Esperanto kaj Zamenhof-busto en la kultura placo en la urbocentro, multaj asocioj viglas post pandemio. La grandaj defioj estas la maljuniĝo de esperantistoj. Junuloj klopodas por pli bonaj laboro kaj vivo, junaj esperantistoj ne estas multaj, nia grava tasko estas esperantistigi junulojn.

La Esperanto-muzeo en Zaozhuang funkcias kadre de la universitato, kaj ne temas pri la sola Esperanto-agado tie. En 2018 estis lanĉitaj kvarjaraj Esperanto-studoj, al kiuj aliĝis 25 studentoj. Ĉu ili volas ligi sian profesion vivon kun Esperanto? Ĉu ili eble fariĝos poste Esperanto-instruistoj kaj daŭrigos la laboron en aliaj urboj?

Ni lanĉis la Esperanto-fakon kun kvarjara studado por trejni profesiajn esperantistojn; kompreneble la defio estas, ke mankas al ili la postenoj en Esperanto, ni devas doni al ili la eblon labori. En la ceremonio de la 10-jara jubileo de la muzeo fondiĝis Esperanto-Instituto, Centro de Instruado-Esplorado de Esperanto, Centro de Historio de Esperanto kaj Azia Biblioteko de UEA en la universitato. La celo de la fondo de la institucio estas trovi postenojn por la diplomitoj de la Esperanto-fako. Inter 25 studentoj nur unu studentino laboras en *El Popola Ĉinio*, la plej multaj

studentoj daŭre studas enlande kaj eksterlande, ĉu por alia fako pri edukado kaj lingvo, ĉu por Esperanto. Sep studentoj nun studas en Poznano interlingvistikon. Mi pensas, ke ili havos laboron pri Esperanto post diplomiĝo.

Kiujn konsilojn vi povus doni por videbligi Esperanton ankaŭ en aliaj universitatoj? Kion fari por prezenti la lingvon kiel ion seriozan kaj konvinki neesperantistojn pri kunlaboro?

Ni planas alvoki kelkajn altlernejojn por kunfandi Esperanto-Asocion (instituton) en nia provinco; krome ni havas planon okazigi ekspoziciojn pri Esperanto en universitatoj en najbaraj urboj por propagandi nian lingvon. Konvinki neesperantistojn ĉiam estas malfacila laboro, laŭ miaj spertoj estas pli bone altigi la valoron de nia lingvo ol simple propagandi ĝin. Nun mia sukceso estas konigi la valoron de Esperanto por interkulturo de nacioj.

Via agado por Esperanto certe postulas multe da viaj laboro, sindediĉo kaj tempo. Ĉu restas al vi iom da libera tempo? Pri kio vi interesiĝas kaj okupiĝas kiam vi ne esperantumas?

Kiam mi estis 19-jara, mi lernis Esperanton kaj ekmovadumis. En mia lernejo mi lernis fotografion, kaj ĝis nun la tekniko helpas nian movadon. En la muzeo multaj fotoj venis el miaj manoj, krome mi estis karboministo kiel elektristo dum kelkaj jaroj. Mi estas homo, kiu ne timas elektron.

Kiujn tri librojn en Esperanto vi kunportus al neloĝata insulo?

Historio de Esperanto de Edmond Privat, *Bazo de Esperanto* kaj *Evento pri Esperanto-Movado*, kiujn mi verkis.

Kvankam antaŭ kelkaj monatoj vi emeritiĝis, vi daŭrigas vian Esperanto-agadon. Kiujn planojn vi havas?

Mi estas engaĝita de la universitato kiel esplora fakulo de la muzeo kaj mi laboros ĝis mia kapablo finiĝos. Mia plano estas: la studentoj, kiuj studas en Poznano laboros en la universitato, mi gvidos ilin kelkajn jarojn. Ni kunkonstruos seriozajn edukajn sistemojn de Esperanto-fako kaj seriozajn sistemojn de protektado de Esperanto-kulturo kaj esplorado de la historio de Esperanto.

En esperantistaj retdiskutoj oni vidas multe da pesimismo pro la stagnado aŭ krizo en pluraj tradiciaj movadaj strukturoj. Kion vi opinias pri la nuna stato kaj estonteco de Esperanto?

En ĉiu kampo ĉiam estas tiaj voĉoj kaj homoj, Esperanto progresas dum la krizo. Mi prenas la vortojn de la ĉina popola sanktulo Mozi, kiel “Praktikado” kaj “Interamo”. Praktikado estas grava por ĉiuj esperantistoj, veraj esperantistoj neniam ĉesas antaŭ fidiroj. Interamo estas moralo de veraj esperantistoj.

Intervjuis **Paweł Fischer-Kotowski**

Eventoj



Litovio, eta lando ĉe la Balta Maro, daŭre restas unu el la plej aktivaj en Esperantujo, kaj en la decembraj Zamenhof-Tagoj en Kaŭno oni povis aŭdi pri atingoj en 2023 kaj pri planoj por 2024, inter kiuj estas okazigo de la 80a Internacia Junulara Kongreso en Ŝventoji – unuafoje en Baltio. Sur la supra foto Eidmantė Lileikytė rakontas pri la junulara agado en Litovio (Foto: Gražvydas Jurgelevičius).

Litovio: Sukcesa kaj promesplena jaro 2023

La 16-17an de decembro 2023 en Kaŭno okazis la vica 58a Kongreso de Litova Esperanto-Asocio (LEA) kaj la tradiciaj Zamenhof-Tagoj 2023. La kongreso estis ne tute vica, ĉar dum ĝi estis elektitaj novaj prezidanto kaj estraro de Litova Esperanto-Asocio (LEA) pro la fino de la kvinjara mandatperiodo de la elektitoj en 2018. Ambaŭ sinsekvajn aranĝojn partoprenis 80 esperantistoj el 12 urboj de Litovio (Kaŭno – 33, Vilno – 20, Šiauliai – 10, Panevėžys – 8, Jurbarkas – 2, Mažeikiai, Šakiai, Klaipėda, Ukmergė, Kuršėnai, Alytus, Jonava – po 1).

La kongreson enkondukis la prezidanto de LEA Povilas Jegorovas. Per minuto da silento estis omaĝitaj la samideanoj forpasintaj dum la 2023a jaro: Tatjana Šilienė, Veronika Birutė Bružilaitė, Regina Mašalaitė-Grzębowska, Algimantas Pijus Vizgirdas.



Sekvis raporto de la prezidanto de LEA pri la agado de Litoviaj esperantistoj dum 2023. Li substrekis, ke la forpasanta jaro por Litoviaj esperantistoj estis vere bona, enhavoriĉa, sukcesa, rezultodona kaj promesplena, tamen intensa, streĉita kaj komplika. Estis gravaj atingoj.

Kiel ĉiam, LEA laboris laŭ kelkaj ĉefaj movadaj direktoj – informado, eldonado, instruado, internaciaj ligoj, organizado de aranĝoj, junulara agado. La ĉefaj ĉi-jaraj atingoj estis daŭra migrado de la ekspozicio pri la vivo kaj agado de Zamenhof, organizado de la 16a kampadejo de Litoviaj esperantistoj-ĵurnalistoj, organizado de la unua aŭtuna kunflugo de Litoviaj esperantistoj, aperigo de du libroj de Petras Čeliaskas. La jaron kronis subskribo de kunlabora kontrakto inter LEA kaj Universitato Vytautas La Granda.

La migranta Zamenhof-ekspozicio, preparita de Pola instituto en Vilno kaj de Litova Esperanto-Asocio, ĉi-jare estis eksponita en pliaj ok urboj: Radviliškis, Kuršėnai, Kelmė, Naujoji Akmenė, Plungė, Mažeikiai, Telšiai, Skuodas. Entute ekde 2017 la ekspozicio estis eksponita jam en 45 urboj. Laŭplane, ĝi devos esti montrita en ĉiuj 60 Litoviaj distriktoj kaj kelkaj pliaj pli grandaj. La ekspozicion en ĉiu urbo akompanas granda informa kampanjo – artikoloj en distriktaĵoj, novaĵrelejoj, lokaj radioj kaj televido. Kutime la ekspozicio estas montrata en distriktaĵoj, bibliotekoj, kulturcentroj, lokaj muzeoj.

Ĉi-jare en 1000 ekz. aperis nova Granda Esperanta-litova vortaro de Petras Čeliaskas. Ĝi entenas 52 mil vortojn. Ĝin kunlabore kun Litova Esperanto-Asocio eldonis Monda centro de litovoj en Kaŭno. La vortaro estis prezentita dum la 16a kampadejo de esperantistoj-ĵurnalistoj en Antalkiai apud Kaŭno. Tiamaniere Litovio nun havas ambaŭdirektajn grandajn vortarojn – la Granda Litova-Esperanta vortaro de la sama aŭtoro kun 45 mil vortoj aperis fine de 2018.

Por Litoviaj esperantistoj granda evento estas ankaŭ aperigo de libro de rememoroj de litova Esperanto-veterano Petras Čeliasuskas *Mano gyvenimo kelionė* (Vojaĝo de mia vivo). Ankaŭ ĉi tiun riĉe ilustritan libron eldonis Monda centro de litovoj. Ĝi estis prezentita dum la unua aŭtuna kunflugo de Litoviaj esperantistoj en Antalkiai. Grandan parton de la libro okupas rememoroj de la aŭtoro pri la esperantista agado. La aŭtoro en marto 2024 fariĝos 95-jara.

La ĉefa jara evento, kompreneble, estas subskribo de la kunlabora kontrakto kun Universitato Vytautas la Granda. Antaŭ tiu evento estis longdaŭra preparlaboro – estis multaj kontaktoj kun universitataj homoj, preparado de dokumentoj, renkontiĝoj kun diversaj funkciuloj k.s. La kontrakto malfermas bonajn perspektivojn kaj vojojn al gravaj agadterenoj – instruado de Esperanto en la universitato, transdono de la asocia biblioteko al la universitato, organizado de komunaj aranĝoj, kunlaboro en esplorado pri Esperanto-temoj, uzo de ejoj de la universitato por bezonoj de Litova Esperanto-Asocio k. s. Jam estas interkonsentite, ke la 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj estos komuna aranĝo de la universitato kaj LEA en julio 2025. Tio estas unika evento laŭ sia graveco ne nur en Litovio, sed ankaŭ tutmonde. La evento ne havas precedencojn en aliaj landoj.

Se paroli pri informado pli vaste oni devas mencii, ke LEA havas bonajn kunlaborajn kontaktojn kun pli ol dek gazetoj, novaĵretejoj, en kiuj konstante kaj regule aperas diversaj aktualaj Esperanto-materialoj. Daŭris publikigo de intervjuoj kaj artikoloj en novaĵretejo *Mano kraštas*. Aperis artikoloj okaze de ĉiuj gravaj Esperanto-eventoj en Litovio. Krome, estis publikigitaj artikoloj en aliaj Litoviaj urboj – Šiauliai, Panevėžys, Jurbarkas k. a.

En kampo de eldonado aperis ankoraŭ kelkaj libroj – poezia libreto de Angelė Straleckienė en Marijampolė, dulingva poezia libro de la jam forpasinta esperantisto Vidmantas Striužas, tre grava libro pri la elstara litova esperantisto Liudas Alseika (1887-1960). Nun estas preparata por eldono dulingva libro pri la legenda blinda esperantisto Vasilij Jeroŝenko. Ĝin verkis universitata profesoro en Šiauliai Vytautas Gudonis.

Instruado de Esperanto okazas en la universitato de sansciencoj de Kaŭno, en la universitato Vytautas la Granda. En ambaŭ lokoj instruas Aida Čižikaitė, ekde nova semestro tio esence intensiĝos. Gediminas Degėsys konstante gvidas retan kurson en Vilno. Instruado de Esperanto okazas en Šiauliai kaj Panevėžys. Tamen tiun laboron necesas plivastigi. Estas planate organizi instruadon ankaŭ en aliaj universitatoj kaj altlernejoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 144-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Zamenhoffesto en Berlino

Ankaŭ ĉi-jare esperantistoj el Berlino kaj Brandenburgio invitis al Zamenhoffesto, kiu okazis la 2an de decembro en la jam tradicia renkontiĝejo de la distrikto Lichtenberg, kiu nomiĝas Kiezspinne (kvartala araneo). Estas bona afero koni la ejon kaj la tie laborantajn homojn. Venis 40 personoj al nia Zamenhoffesto, inter ili estis ankaŭ dek geamikoj el Szczecin. Ankaŭ ni tre ĝojis pro la partopreno de samideanoj el Magdeburg kaj Halle, kiuj alvenis aventuro per trajno.

La festo estis bela fino por la jaro 2023. Ni bone celebris la naskiĝdaton de la kreinto de la internacia lingvo Esperanto. Samtempe la festo estis dediĉita al la Esperanto-libro, pro tio ne nur funkciadis la tradicia libroservo de Johano Pachter dum la tuta tempo de la aranĝo, sed ankaŭ estis prezentitaj diversaj libroj. Inter tiuj troviĝis la gvidlibroj pri regionoj en Berlino, kiujn verkis Fritz Wollenberg. Ronald Schindler prezentis la librojn de Helga Plötner, kiu ĉiukajere prezentis 16 famajn geesperantistojn per desegnitaj portretoj kaj tekstoj pri ties vivo kaj meritoj.

La festprelegeton prezentis Philipp Sonntag, kiu kiel kasisto ĉi-foje ne prelegis pri mono, sed pri “Maltrankvilaj tempoj – kun kontempla Esperanto”, ligita kun enketado por la partoprenantoj. Sed ankaŭ estas invititaj ĉiuj aliaj, kiuj deziras plivigliĝi la Esperanto-vivon en Berlino, Brandenburgio kaj aliloke.

Ĉiuj ĉeestintoj ĝuis la koncerton de Stefo (Stephan Schneider), kiu prezentis multajn novajn kantojn el sia repertuaro. Margarete Bastian kun helpanto prezentis



mallongan teatraĵon “Sur la monto la vento blovas”, kiu baziĝas sur popolokanto el Bavario. Grandan tempospacon niaj geamikoj el Szczecin dediĉis al Wisława Szymborska, pola Nobel-premiita poetino. Krzysztof Łobacz kaj kelkaj kunvenintoj prezentis ŝian vivon kaj diversajn ŝiajn poemojn. Temis pri tre altranga prezentaĵo kaj ĉiuj gajnis grandan aplaŭdon.

Memkompreneble la kutimaj frandaĵoj ne mankis. Okaze de la posttagmeza kafumado eblis gustumi Kristnaskajn kukojn kaj ĉokoladaĵojn. La polaj geamikoj denove kunportis bongustajn bakaĵojn kaj papavan paston. Pro financaj aferoj ni ne mendis apartan vespermanĝon de la kunvenejo, tamen ĉiu trovis ion por manĝi kaj trinki. Ulrich Brandenburg, iama prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, aldonis ĉipsojn kaj oranĝan sukron, kiuj restis de la 100a Germana Esperanto-Kongreso, okazinta en 2023 en la urbo Brunsvigo. Interesaj memoraĵoj.

Ĉi-foje ni planis pli da tempo por interparoli. Tion deziris la partoprenintoj de la pasintaj Zamenhoffestoj. Kelkfoje dum la vespero eblis aŭskulti Kristnaskajn kantojn de la pola kantistino Anna Osmakowicz, prezentita de Roland Schnell.

La sekvonta Zamenhoffesto okazos la 30an de novembro 2024 en la sama domo. Do jam notu la daton por certigi vian partoprenon!

Ronald Schindler

Zamenhof-festo kaj ne nur en la Esperanto-urbo

Ĉirkaŭ la jaro 1970 la Esperanto-pioniro Joachim Gießner komencis organizi Zamenhof- kaj Kristnaskofeston por la tiutempe nova Esperanto-klubo en Herzberg. Dum la unuaj jardekoj ni festis tion en la proksima kvarstela hotelo “Englischer Hof” (Angla Korto). Ankaŭ aperis esperantistoj el aliaj lokoj.

Absoluta rekordo okazis en decembro 1989, tuj post la falo de la “Fera kurteno”, kiam venis pli ol cent esperantistoj, ĉefe el la proksima GDR, ekzemple, el la grandurboj Erfurt, Leipzig, Halle kaj Magdeburg. Nia urbo Herzberg ja troviĝas nur kelkajn kilometrojn de la federaciaj landoj Turingio kaj Saksio-Anhaltio. Siatempe okazis eĉ dutaga amikecfesto kun abundaj manĝaĵoj, babiladoj, ktp. Multaj tranoktis en la bela hotelo. Ekestis multaj novaj amikecoj, kiuj ofte daŭris dum jardekoj.

Ĉiujare ni plu festas la jam tradician Zamenhof-feston en Herzberg, sed ni ŝanĝis la hotelon kaj restoracion. Joachim Gießner ĝis 2000 ĉiam tradukis tradician germanan kristnaskokanton al Esperanto. Ni komune interbabiladis, kune kantis, raportis pri la Esperanto-aktivecoj kaj komunaj planadoj.

Ĝi estas demonstra versio de la 144-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Vigla Esperanto-semajno en ĉina elementa lernejo

Ĉi-decembre la vintro estas eksterordinare frosta, la neĝo falis pli frue kaj furioze, kaj la tuta tero nur dum unu nokto kovriĝis per dika neĝtavolo. En ĉi tiu fabela mondo, sur la sportejo de la elementa lernejo Baiyangshujie en la ĉina urbo Taiyuan oni okazigis la 11an Esperantan Semajnon, kiu estas rigardata de la lernejoj kiel plej grava kaj ŝatata festo en la tuta jaro. Ĉie vi povas senti gajan etoson, kaj la... varmecon de la vintra fajro.

En la elementa lernejo Baiyangshujie estas ĉirkaŭ 1.400 lernejoj. En la printempo 2008 la lernejo enkondukis Esperanton kiel devigan kurson por faciligi la lernadon de la angla lingvo, sed dum la instruado oni trovis, ke la ideo de Esperanto havas neimageblan edukatan signifon. Do ekde 2013 por pli bone ekspluati ĝian edukatan valoron kaj disvastigi ĝian esencan spiriton, la lernejo decidis ĉiujare okazigi la Esperantan Semajnon ĉirkaŭ la 15a de decembro, la Zamenhofa tago.

Dum la semajno oni kutime aranĝas diversajn aktivadojn, ekzemple prelegojn, konkursojn de verkado kaj pentrado, prezentadon de kantoj kaj teatroj, kaj Esperanto-kurson por gepatroj ktp, ĉio por kaj pri esperanto. Pro la influo de la semajno multaj infanoj kaj gepatroj ekamas nian lingvon. Ĉiujare, kiam alproksimiĝas la Esperanta Semajno, la infanoj ekviglas kaj aspiras ĝian revenon, eĉ tiuj, kiuj jam





foriris de la lernejo al la pli altgradaj lernejoj, ne povante forgesi ĝian varmecon, telefonas aŭ skribas al lernejo por esprimi sian gratulon kaj sopiron al la iama ŝatata festo. Ĉar la fajro de la Esperanto-semajno en vintro ĉiam brilas en iliaj koroj.

Ĉi-semajne, leginte la leterojn de tiuj, kiuj jam eniris en alt-mezlernejojn, la lernejestro Jado kun kortuŝita koro verkis la poemon *Nostalgio* kies lasta strofo estas jena:

*Hodiaŭ mi sonĝe vagas konatejen,
kiel vojaĝanto revenas jam hejmen.
Via vintra fajro allogas nin, mio
sopiras neretene, kun nostalgio.
Sorĉas ĉiun Verda Baiyangshu-lernejo!*

La 11a Esperanta Semajno fermiĝis la 25an de decembro. Ĉi-jare oni elektis novajn Bravajn Esperantistajn Knabinojn kaj Sinjoretojn. Ili estas diligentaj infanoj en lernado de Esperanto, eĉ dum la trijara pandemia periodo, kiam la lernejo funkciis neregule, ili ne forlasis Esperanton. Donacante premion al ili, sinjoro Jado diris: "Post unu jaro via lernado en la elementa lernejo jam finiĝos, sed por via tuta vivo tio ĉi nur estas ekkomenco, ni esperas, ke Esperanta spirito ĉiam vivos kun vi, kaj vi ĉiam memoros la belajn tagojn en Baiyangshujie-lernejo kun Esperanto".

Jatina

Hispana Kongreso de Esperanto en varma etoso

La 81a Hispana Kongreso de Esperanto okazis en la urbo Seviljo, la ĉefurbo de Andaluzio. Oni celebris ĝin en esceptaj datoj, de la 12a ĝis la 15a de oktobro, profitante longan semajnfinojn pro la nacia hispana festo, por eviti la tre altajn temperaturojn kutimajn en somero, sed ni ĝuis preskaŭ someran veteron, kun temperaturoj ebligantaj mallongmanikajn T-ĉemizojn kaj ĉeterasan manĝetadon dum la tuta daŭro de la kongreso.

Antaŭ la kongreso mem, la 10an kaj 11an de oktobro, estis organizita en la Universitato de Seviljo Internacia Seminario pri Sociaj Retoj kaj Homa Konduto, en kiu partoprenis pluraj profesoroj kaj fakuloj, kelkaj el la Sevilaj universitatoj mem, kelkaj venintaj ene de eŭropa projekto. Reĝisoritan de Vicente Manzano, ĝin organizis la entrepreno Civiencia, kun apogo de la Departemento pri Eksperimenta Psikologio kaj la Fakultato pri Filologio de la Universitato de Seviljo. La prezentadojn eblas spekti en la jutuba kanalo de Civiencia <https://www.youtube.com/civiencia>.

La kongreson organizis la loka Esperanto-grupo, sufiĉe tradicia kaj aktiva. Tiuj trajtoj ebligis la ĵusan verkadon de libro pri la ampleksa historio de Esperanto en Seviljo. La kvar verkintoj de la libro prezentis ĝin, kaj profitis por omaĝi kelkajn pionirojn, inter kiuj la relanĉinton de la movado en la urbo post la fino de la diktaturo, konatan kiel Antolín Colmenar, kvankam lia vera nomo estis Tomás Caspe Cereijo (li kaŝe ŝanĝis sian nomon post la hispana intercivitana milito por eskapi reprezaliojn).

La kongreso ĝuis la ĉeeston de la prezidantoj de UEA, Duncan Charters, kaj de IFEF, Rodica Todor, kaj de la estrarano de ILEI, Laura Brazzabeni, kiuj kune kun la prezidanto de la LKK, José Roldán, kaj de HEF, Ángel Arquillos, inaŭguris la eventon.



Tre varia estis la temaro de la prelegoj. Pri filmoj en Interreto (eĉ du prelegoj: unu de Pablo Busto pri la kolekto de esperantaj filmoj Tubaro <https://tubaro.ape.ru.net/>, kaj alia de la plej juna preleganto verŝajne en ĉiuj Esperantaj kongresoj, Gabriela Manzano pri la kanalo PikaPika <https://www.youtube.com/pikapika-eo>), pri libera kulturo kaj liberaj programoj ankaŭ en Esperanto (Jorge Maldonado), pri instruado de Esperanto en la Andaluza Publika Eduksistemo (Antonio Fabián Jiménez), pri deveno de la lingvoj kaj de la lingva diverseco (Philippe Planchon), pri la spaca programo Artemiso (Carlos Spínola), pri la ĉinaj ideogramoj (Juan García del Río) aŭ pri la bibliotekoj tra la historio (Ana Manero). La ferma parolado estis tiu de Duncan Charters, pri la ĉeftemo de la kongreso “Komprenemo inter popoloj”.

Spektakloj estis diversaj, kun pluraj amatoraj teatraj prezentoj. Pri la muziko zorgis lokaj artistoj: soprano Rocío de Frutos, kiu kantis diversajn pecojn de opero, ĉefe ligitajn kun la urbo Seviljo mem (kaj fine regalis nin per interpreto de *La Espero*, kiun vi povas ĝui en la jutuba kanalo de HEF ĉe: <https://www.youtube.com/watch?v=APMSlftHfM>), kaj grupo de kastanĵetoj. La aŭkcion gvidis Toño del Barrio. Estis ankaŭ kursetoj de Esperanto, kaj abunda libroservo.

Ĉeestis 150 kongresanoj el dudeko da landoj. La venonta kongreso okazos en septembro 2024 en la Valencia regiono.

José Antonio del Barrio

Centjariĝa festo de EPA en Kameoka

La 100-jara Memorevento de la fondiĝo de Esperanto-Populariga Asocio (EPA) okazis ĉefe ĉe Oomoto-Centro en Ten'onkjo, la urbo Kameoka de la gubernio Kioto, Japanio, la 16-18an de septembro kun 79 eksterlandaj kaj 251 japanaj ĉeestantoj.

Antaŭtagmeze de la unua tago, oni spektis la filmon *Paŝoj de Oomoto, Paŝoj de IRUHA* (Internacia Reto de Universala Homama Asocio). Miyoshi Etsuo prelegis pri la temo “Celante al Fina Venko” dulingve; japane kaj Esperante.

Poste okazis la simpozio “Al la futuro post 100 jaroj por popularigi Esperanton”. La podianoj estis prof. Lee Jungkee, prezidanto de Seula Esperanto-Kulturcentro el Koreio; d-ino Katalin Kováts, direktoro de la fondaĵo Edukado.net el Nederlando; Mireille Grosjean, eksprezidanto de ILEI el Svislando; Nisinaga Atusi, vicprezidanto de Japania Esperanto-Instituto kaj prezidanto de Azia-Oceania Komisiono de UEA el Japanio; Okuŭaki Toŝiomi, ĝenerala sekretario de EPA.

Ĝi estas demonstra versio de la 144-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



En la urbodomo de Pizo

Vendredon la 17an de novembro, kun ceremonio en la prestiĝa salono Baleari de la urbodomo de Pizo, kaj en ĉeesto de la Honora Konsulo de Pollando en Florenco Stefano Barlacchi, malfermiĝis la Zamenhofa Aranĝo Toskana, tritaga evento de turismo, konferencoj kaj kunvivaj momentoj, dediĉita al Esperanto kaj ĝia kulturo.

La aranĝo prenas sian nomon, krom de Toskanujo, regiono kiu plurfoje gastigis gravajn aranĝojn kiel la Universala Kongreso (Florenco, 2006) kaj la Esperanto-Kongreso en Italio (laste en Pizo, 2007), kaj de Ludoviko Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Se la unuaj verkoj en Esperanto estas de Zamenhof mem, la aŭtoroj de referenco en la nuna Esperanto estas multaj: francaj (Waringhien), hungaraj (Kalocsay, Baghy), skotaj (Auld) por nomi nur kelkajn. Multaj verkistoj el diversaj partoj de la mondo kaj el diversaj kulturoj kreis kulturon kaj literaturon, kiu estas karakterizita per diversaj temoj kaj stiloj.

La Zamenhofa Aranĝo Toskana estis organizata de Grupo Esperantista Piza, realaĵo radikita en la teritorio de pli ol kvindek jaroj kaj al kiu estas ligitaj la figuroj de Giuseppe Pacelli, Agostino Brizzi kaj Giuseppe Martini.

Ĝi estas demonstra versio de la 144-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Ĉu en la jaro de la 75a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, ĉi tiuj rajtoj estas respektataj? La tekstoj de esperantistaj asocioj, publikigitaj en “Tribuno”, ne konfirmas tion, almenaŭ se temas pri Ukrainio kaj Palestino.

Deklaro de ELI pri la milito en Gaza

La origina versio



En la spirito de la Zamenhofa revo pri monda paco, Esperanto-Ligo en Israelo kondamnas ĉiujn militojn kaj subtenas diplomatiajn solvojn de konfliktoj, inkluzive de la centjara konflikto inter judoj kaj araboj en la Mezoriento.

Tamen, ne eblas senhorore akcepti la teruraĵojn, kiuj okazis la 7an de Oktobro: amasa masakro de ĉ. 1,200 israelaj civitanoj, plejparte infanoj (eĉ beboj!), virinoj kaj maljunuloj, plenumita far la fundament-islamisma ekstremisma teror-organizo Ĥamas, kun ne imageblaj kruelaĵoj (inkluzive senkapigon, perfortadon, torturadon kaj vivbruligon de la viktimoj). Neniam post la Holokaŭsto estis tiom da judoj murditaj dum unu tago, nur ĉar ili estis judoj kaj israelanoj (inter la viktimoj pluraj tamen estis ne-judoj kaj eĉ eksterlandanoj).

Estis kidnaptaj pli ol 240 personoj, kiuj daŭre restas en la manoj de Ĥamas en la Gaza-Strio, sen ajna informo aŭ vizito de la Ruĝa Kruco. Ili ĉiuj devas esti liberigitaj tuj kaj senkondiĉe. Por ke tiaj krimagoj ne ripetiĝu, nepras ekstermi la regnon de Ĥamas. Bedaŭrinde ankaŭ la palestinaj loĝantoj de la Gaza-Strio multe suferis, suferas kaj suferos pro la milito, kiun iniciatis iliaj Ĥamas-regantoj – milito tamen ne evitebla, por ebligi daŭripovan solvon kaj estontan rekonstruon de Gaza kaj de la ĉirkaŭa regiono en Israelo.

[Post negativaj komentoj en la reto la lasta frazo estis korektita: anstataŭ “milito tamen ne evitebla” aperis “tamen ne eviteblas la disrompo de tiu ĉi teror-organizo”, kaj en la fino estis aldonita frazero: “profite por ambaŭ popoloj”. — La red.]

La korektita versio

En la spirito de la Zamenhofa revo pri monda paco, Esperanto-Ligo en Israelo kondamnas ĉiujn militojn kaj subtenas diplomatiajn solvojn de konfliktoj, inkluzive de la centjara konflikto inter judoj kaj araboj en la Mezoriento.

Tamen, ne eblas senhorore akcepti la teruraĵojn, kiuj okazis la 7an de Oktobro: amasa masakro de ĉ. 1,200 israelaj civiluloj, plejparte infanoj (eĉ beboj!), virinoj kaj maljunuloj, plenumita far la fundament-islamisma ekstremisma teror-organizo Ĥamas, kun ne imageblaj kruelaĵoj (inkluzive senkapigon, perfortadon, torturadon kaj vivbruligon de la viktimoj). Neniam post la Holokaŭsto estis tiom da judoj murditaj dum unu tago, nur ĉar ili estis judoj kaj israelanoj (inter la viktimoj pluraj tamen estis ne-judoj kaj eĉ eksterlandanoj).

Estis kidnapiĵoj pli ol 240 personoj, kiuj daŭre restas en la manoj de Ĥamas en la Gaza-Strio, sen ajna informo aŭ vizito de la Ruĝa Kruco. Ili ĉiuj devas esti liberigitaj tuj kaj senkondiĉe. Por ke tiaj militkrimoj ne ripetiĝu, nepras ekstermi la regionon de Ĥamas. Bedaŭrinde ankaŭ la palestinaj loĝantoj de la Gaza-Strio multe suferis, suferas kaj suferos pro la milito, kiun iniciatis iliaj Ĥamas-regantoj – tamen ne eviteblas la disrompo de tiu ĉi teror-organizo por ebligi daŭripovan solvon de la konflikto kaj estontan rekonstruon de Gaza kaj de la ĉirkaŭa regiono en Israelo, profite por ambaŭ popoloj.

Kontraŭmilita, porpaca deklaro de UEA, TEJO kaj ILEI

La daŭre raportataj novaĵoj pri la aktuala konflikto en Mezoriento reliefigas la sekvojn de militoj por la popoloj de nia mondo, aparte kiam ankaŭ civiluloj estas trafitaj per morto kaj suferado pro vundiĝo aŭ manko de necesaj vivrimedoj.

Ne nur en Mezoriento sed en pluraj mondpartoj okazas dekoj da perfortaj militaj konfliktoj, kiuj pereigas kaj suferigas senkulpulojn, ne esceptante infanojn.

Okaze de la UN-tago, la 24an de oktobro, Universala Esperanto-Asocio ripetas sian firman subtenon de paca solvo de konfliktoj. Laŭstatute neŭtrala pri politikaj pozicioj, UEA, kun la subteno de TEJO kaj ILEI, tamen apogas konfliktsolvadon laŭ diplomatiaj kaj aliaj iniciatoj kaj rimedoj, grupe kaj individue. La Esperanto-parolanta komunumo celas progresigi la homaron al ĉesigo kaj eliminado de militoj, kaj al pli paca kunvivado per transnacia respekto al homaj rajtoj, kiuj inkluzivu lingvan, kulturen kaj socian justecon por popola interkompreniĝo.


La 10an de decembro ĉi-jare okazos la 75a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiu donos al la popoloj la okazon reagnoski ĝiajn principojn kaj idealojn. Tiu ĉi deklaro en pluraj artikoloj principe kontraŭstaras akcepton de daŭraj militaj konfliktoj. Ekzemple, neniu homo suferu “kruelan, nehuman aŭ sendignigan traktadon” (artikolo 5) kaj ĉiu havu la “rajton je vivnivelo adekvata por la sano kaj bonfarto de si mem kaj de sia familio” (artikolo 25).

Universala Esperanto-Asocio deklaras sian aliĝon al tiuj principoj, laŭ artikolo 5 en sia Statuto: “bonaj internaciaj rilatoj kaj respekto al la homaj rajtoj ... estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj”. Ni strebas individue kaj kolektive kun TEJO, ILEI, samprincipaj organizaĵoj registaraj kaj neregistaraj, por krei la bazojn por daŭra senperforta kaj egaleca interkompreniĝo, celante al natura pacemo inter individuoj kaj popoloj, rekonante ĉies dignon.

Ĝi estas demonstra versio de la 144-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>



Okaze de la 164a naskiĝdatreveno de Lazarj Markoviĉ “Ludoviko” Zamenhof ni publikigas poŝtkarton, kiun la 20an de marto (Gregorie: la 1an de aprilo) 1890 li sendis el Ĥersono al Christian Schmidt.

Jubileoj kaj memordatoj en januaro 2024

1. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Grégoire Maertens** (1924-1940-), belga financoficisto kaj esperantisto; komitatano (1960-2004), estrarano (1977-92) kaj prezidanto (1980-86) de UEA, direktoro de Instituto Hodler'68 (1972-2013), aŭtoro de pluraj artikoloj en/pri Esperanto, honora membro de UEA (1993), honora prezidanto de Instituto Hodler'68 (2013). Sub lia prezidanteco okazis plivastigo de la domo de la CO de UEA en Roterdamo, daŭra membrokreskado (je pli ol ses mil personoj dum ses jaroj), financa stabiligo de la asocio kaj funkciigo de UEA-oficejoj en Novjorko (rilatoj kun UN), Budapeŝto (scienco, terminologio) kaj Antverpeno (kompostado kaj presado).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 186-187).

3. Antaŭ 85 jaroj naskiĝis **Eugène de Zilah** (1939-1953-2020), hungara filozofo, instruisto, poligloto kaj esperantisto, de 1956 loĝinta en Francio; kunfondinto de Filozofia Asocio Tutmonda (1982), Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj (1988) kaj de *La Gazeto* (1985), redaktoro de ĉiuj aperintaj numeroj de *La Gazeto* ĝis la ĉeso en 2019; aŭtoro de *Vivi sur barko* (1994), *Kaj kiu pravas* (2002), *La princo ĉe la hunoj* (2011), tradukinto de *Diskurso pri la metodo* de R. Descartes (1985); laŭreato de la premio Ada Sikorska Fighiera (2011) kaj de la diplomo de UEA pro elstara arta agado (2014).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 306-307).

4. Antaŭ 75 jaroj naskiĝis **Spomenka Štimec** (1949-1965-), kroata filologino dum 40 jaroj laborinta per Esperanto ĉe Internacia Kultura Servo (1972-94) kaj Kroata Esperanto-Ligo (1995-2012); redaktorino de *Tempo* (1996-), estrarano de UEA (1989-92), membro de la Akademio de Esperanto (AdE, 1998-2007), aŭtorino de kvar originalaj romanoj (*Ombro sur interna pejzaĝo*, 1984; *Tena – Hejmo en Mezeŭropo*, 1996; *Tilla*, 2002; *Hodler en Mostar*, 2006) kaj kvin novelaroj; laŭreato de la diplomo de UEA pro elstara arta agado (2010).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 278-280).

5. Antaŭ 25 jaroj mortis **Ye Junjian** (1914-1931-1999), konata en Esperanto kiel **Cicio Mar**, ĉina verkisto kaj tradukisto, vicprezidanto de Ĉina Tradukista Asocio kaj de Ĉina PEN-Centro, poligloto kaj esperantisto; komitatano de UEA (1980-92), rektoro de IKU en la 71a UK (Pekino, 1986), vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo,

aŭtoro de la originala novelaro *Forgesitaj homoj* (1937); lia anglalingva romano *Montara vilaĝo* aperis en la Esperanta traduko de William Auld (1984).

9. Antaŭ 145 jaroj naskiĝis **Vicente Inglada Ors** (1879-1899-1949), hispana armeano, sciencisto, poligloto kaj esperantisto; kunfondinto (kun A. Jiménez Lora, 1903) kaj longtempa redaktoro de la unua hispana Esperanto-gazeto *La Suno Hispana*, vicprezidanto de Hispana Societo por Propagando de Esperanto, dekomenca membro de la Lingva Komitato (LK, 1905-47), membro de AdE (1911-47); aŭtoro de tri beletraj libroj (*Edziĝo malaranĝita aŭ Terura nekomprenejo*, 1907; *Prozo kaj versoj*, 1908; *En la Barcelona Kongreso*, 1910) kaj de pluraj lernolibroj kaj vortaroj; tradukinto de pluraj hispanaj verkistoj, interalie, de tri libroj de J. Benavente: *La nesia hejmo* (1909), *Hispanaj dramoj* (1911), *La kreitaj profitoj* (1932).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 135-136).

22. Antaŭ 185 jaroj naskiĝis **Wilhelm Heinrich Trompeter** (1839-1888-1901), germana mineja subtermezuristo, volapukisto kaj pionira esperantisto (N^o918), fondinto de Esperanto-grupo en Schalke (la kvara Esperanto-societo en la mondo, 1890); dum tri jaroj (1892-94) W. H. Trompeter pagis la eldonkostojn de *La Esperantisto* kaj pagis al L. Zamenhof ĉiumonatan redaktoran salajron; adaptis por germanlingvanoj kaj eldonis la poŝan lernolibron kun du ampleksigitaj vortaroj de L. Zamenhof (1891) kaj pretigis la germanan version de la origine rusingva Zamenhofa verko *Mallongaj sciigoj pri la lingvo internacia Esperanto* (1895).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 285-286).

22. Antaŭ 40 jaroj mortis **Clelia Conterno Guglielminetti** (kontérno guljelminétti, 1915-1934-1984), itala ĵurnalistino, verkistino kaj esperantistino; dufoja laŭreato de la Belartaj Konkursoj de UEA (poste membro de la juĝkomisiono), laŭreato de la Internaciaj Floraj Ludoj (1981); aŭtoro de *Eta vivo* (1969), *Unu tago post la alia. Letero al infano naskita* (1982), *Ho, tomboj de l' prapatroj* (aperis posteume en 2015); membro de AdE (1964-84), membro de *La Patrolo* (1970).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 59-60).

25. Antaŭ 140 jaroj naskiĝis **Montagu Christie Butler** (bátler, 1884-1905-1970), angla muzikisto kaj esperantisto; sekretario de Brita Esperanto-Asocio (BEA, 1916-34), redaktoro de *The British Esperantist* (1931-32, 1941-44, 1947-48); prizorganto de la biblioteko de BEA kiu nun havas lian nomon, membro de la Akademio de Esperanto (1949-70); aŭtoro kaj tradukinto de pluraj verkoj, inter

kiuj elstaras la lernolibroj *Esperanto for beginners* (21 eldonoj) kaj *First steps in Esperanto* (poste *Step by Step in Esperanto*, 9 eldonoj).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia diligenta kolegaro* (p. 51-52).

26. Antaŭ 95 jaroj naskiĝis **Ada Fighiera-Sikorska** (1929-1956-1996), pola ĵurnalistino kaj esperantistino; kunlaboranto de la Esperanto-Redakcio de la Pola Radio ekde la komenco (1959) ĝis la forveturo el Pollando (1960), redaktorino de *Heroldo de Esperanto* (1962-96), aŭtorino de *De tajgo al minaretoj* (1991), honora membro de UEA (1994).

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 91-92).

30. Antaŭ 185 jaroj naskiĝis **Hippolyte Sebert** (sebér, 1839-1898-1930), franca generalo, sciencisto kaj esperantisto, la plej proksima kunlaboranto de Zamenhof; prezentinto de Esperanto en la Franca Akademio de Sciencoj (1901); la unua prezidanto de la Organiza Komitato (poste: KKK) fondita en la 1a UK (1905), fondinto kaj gvidanto de Esperantista Centra Oficejo en Parizo, kunfondinto kaj la unua prezidanto de ISAE (1907), fondinto kaj redaktoro (kun G. Chavet) de *Oficiala Gazeto Esperantista* (1908-20), la unua prezidanto de Konstanta Reprezentantaro de Naciaj Societoj (1922-23); membro de LK (1905-30), aŭtoro de *Sur l'utilité scientifique d'une langue internationale* (1901), *L'Espéranto et les langues nationales* (1909), *La langue internationale auxiliaire Esperanto* (1910), *L'Espéranto et les sociétés de la Croix-Rouge* (1921) kaj de aliaj libroj kaj broŝuroj pri Esperanto.

- Legu pli en la enciklopedio *Nia Diligenta Kolegaro* (p. 251-253).

Aleksander Korĵenkov



Nia Diligenta Kolegaro

Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj

Verkis: Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov

Eldonis: *Sezonoj* kaj Litova Esperanto-Asocio

320 grandaj (enciklopedi-formataj) paĝoj

Portretoj, tabeloj kaj utilaj suplementoj

Prezo: 30 eŭroj

Mendu ĉe via kutima libroservo

<http://esperanto-ondo.ru/Knigi/Kniga120htm>

Pri la granda eraro de Christian Schmidt

Ĉiu interesiĝanto pri la historio de Esperanto scias, ke Zamenhof jam en la 3a numero de *La Esperantisto* (20 dec 1889), kiam la lingvo aĝis nur du jarojn, proponis krei Tutmondan Ligon de Esperantistoj, en kies manoj “kuŝos nun la tuta sorto de nia afero” kaj kiu estu “la sola kaj absoluta leĝdonanto en nia afero”.

Kvankam nur du personoj publike esprimis sin (negative) pri la propono, jam en la 6a numero de *La Esperantisto*, datita je la 25a de marto 1890, aperis la Zamenhofa artikolo *Pri nia Ligo*, en kiu li deklaris: «La “ligo Internacia de Esperantistoj” estas fondita!». Samkajere aperis dulingve la regularo de la Ligo.

Oni scias ankaŭ, ke Christian Schmidt, kiu estis eldonanta la unuan esperantistan gazeton en Nurenbergo, sen konsulti Zamenhofon, faris ŝanĝojn en lia projekto de la regularo kaj dissendis al la abonantoj cirkuleron, kies tekston li ne sendis al la lingvoaŭtoro por aprobo.

Ekzemple, ludovikito en sia *Historieto de Esperanto* komentis en sia senmajusklita stilo:

tiun cirkuleron kaj la n-ran 6 ludoviko ricevis en ĥerson, sekve alia malfacilo aldoniĝis al lia vivo jam sen ĝi sufiĉe turmenta. ni supozas, ke inter li kaj schmidt okazis rapidema interŝanĝo de urĝaj leteroj. supozeble ilia interkompreniĝo ne estis tiom facile akirita.¹

Nek la Nurenberga cirkulero, nek la supozataj urĝaj leteroj ĝis nun estas je nia dispono, sed antaŭ pli ol du jaroj la eksmoskva novjorkanino Julija Malaĥova trovis kaj publikigis en Fejsbuko poŝtkarton, kiun Ludoviko sendis al Schmidt la 1an de aprilo 1890. Kvankam en 2021 en la reto aperis kelkaj referencoj kaj komentoj pri ĉi tiu “novaĵo”, ŝajnas, ke ĝi dum postaj du jaroj aperis en neniuj gazeto aŭ libro, do ni decidis diskonigi ĝin en *La Ondo* kiel modestan kontribuon al la festado de la 164a naskiĝdatreveno de “Nia Majstro”.

Ĉi-sube estas la teksto de la “urĝa” poŝtkarto, kies originalon vidu en la 68a paĝo:

Ĝi estas demonstra versio de la 144-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kulturo



Post la verkoj de Ivan Bunin (marto 2022), Aleksandr Kuprin (junio 2022), Maksim Gorjkij (septembro 2022), Fjodor Sologub (decembro 2022), Leonid Andrejev (marto 2023), Ivan Ŝmeljov (junio 2023) kaj Aleksej N. Tolstoj (septembro 2023) en nia literatura projekto “Rusa Novelaro 2”, en kiu aperas mallongaj prozaĵoj de rusaj aŭtoroj de la 20a jarcento, aperas ses verkoj de Vladimir Nabokov.

Nabokov, la libero de l' spirito

“Mi estas usona verkisto, naskita en Ruslando, edukita en Anglio, kie mi studis la francan literaturon antaŭ transloĝiĝi por dek kvin jaroj en Germanio ... Mia kapo parolas angle, mia koro ruse, kaj mia orelo france”, – konfesis Vladimir Nabokov, la oka aŭtoro en nia projekto “Rusa Novelaro”.

Feliĉe, la vivo kaj verkoj de Vladímir Vladímiroviĉ Nabókov (Набоков, 1899-1977) estas bone konata ne nur en Ruslando, sed ankaŭ eksterlande, kaj mi ne devas doni plejparton de ĉi enkonduko al lia vivo. Mi nur notu la ĉefajn eventojn: naskiĝo “kun ora kulero en la buŝo” en riĉa aristokrata familio en Peterburgo, fuĝo el Petrogrado pro la bolŝevista revolucio, vivo en Krimeo (1917-19), studoj en Kembriĝo (1919-22), vivo en Berlino (1922-37), edziĝo kun Vera Slonim (1925), eskapo al Francio (1937), migro al Usono (1940), reveno al Eŭropo (1960), morto en Montreux (1977).

Por ni, esperantistoj, kiuj estas almenaŭ dulingvaj (la gepatra(j) lingvo(j) kaj Esperanto), estas interese scii, ke de la beba aĝo la juna Vladimir parolis tri lingvojn: la anglan, francan kaj rusan, kaj ke junaĝe li unue ekverkis angle, tamen lia unua presita poemaro (1916) estis verkita ruse, same kiel ĉiuj liaj verkoj aperintaj antaŭ la migro al Usono, kie li preskaŭ plene transiris al la angla, kaj uzis la rusan nur por traduki sian membiografion *Conclusive Evidence* (ruse: *Дрызgue беpeза*, t. e. Aliaj bordoj) kaj *Lolita*.

Estas interese legi du fragmentojn, en kiuj Nabokov komparas verkadon en la angla kaj rusa lingvoj:

I. “Neniu el miaj usonaj amikoj legis miajn rusajn librojn, kaj ĉi tiel ĉiu takso, bazita sur mia angla beletra verkaro, ne povas ne esti nur proksimuma. Mia privata tragedio – kiu ne povas, nek devas koncerni iun – estas, ke mi devis rezigni mian naturan parolon, mian de nenio ĝenatan, riĉan, absolute obeeman al mi rusan lingvaĵon, favore al la duagrada speco de la angla lingvo...” (El la postparolo al la unua Usona eldono de *Lolita*, verkita en 1956).

II. “Mi tiel pasie ripetadas al la usona legantaro pri la supereco de mia rusa lingvaĵo super mia lingvaĵo angla, ke iu slavisto povas reale ekpensi, ke mia traduko de “*Lolita*” estas centoble pli bona ol la originalo. Sed mi nur sentas naŭzon pro la grincado de miaj rustaj rusaj kordoj. La historio de ĉi tiu traduko estas historio de senesperigo. Ve, tiu “mirinda rusa lingvo”, kiu, kiel ŝajnis al mi, ankoraŭ ie atendas min, floras, kiel la fidela printempo post zorge ŝlosita pordego, ŝlosilon de kiu mi longe konservis, evidentiĝis neekzistanta, kaj post la pordego estas

nenio, krom bruligitaj arbostumpoj kaj aŭtuna senespera foro, kaj la ŝlosilo en mia mano estas pli simila al dirko.

“Mi konsolas min, unue, per tio, ke en la plumpeco de la proponata traduko kulpas ne nur la tradukinto, malkutimiĝinta de sia denaska lingvo, sed ankaŭ la spirito de la lingvo, al kiu estas farata la traduko. Dum la jarduona laboro pri la rusa “Lolita” mi ne nur konvinkiĝis pri perdo de multaj miaj personaj luksaĵetoj kaj nerestarigeblaj lingvaj rutinoj kaj trezoroj, sed mi venis ankaŭ al kelkaj ĝeneralaj konkludoj pri la reciproka tradukeblo inter la du ravaj lingvoj.

La korpaj movoj, mienoj, pejzaĝoj, langvoro de arboj, odoroj, pluvoj, degelantaj kaj muaraj nuancoj de l’ naturo, ĉio tenera-homa (kvankam tio strangas!), kaj ankaŭ ĉio kampula, kruda, suka-obscena, ruse rezultas ne malpli bone, sed eble pli bone ol angle; sed la propraj al la angla lingvo nefindirito, poezio de l’ penso, rapidega resaltado inter plej abstraktaj nocioj, svarmado de unusilabaj epitetoj, ĉio ĉi, ankaŭ ĉio rilata al teĥniko, modoj, sporto, natursciencoj, kaj kontraŭnaturaj pasioj – en la rusa iĝas malfajna, multvorta kaj ofte abomena en la senco de la stilo kaj ritmo. Ĉi tiu malkongruo respegulas la ĉefan historian diferencon inter la june verda rusa literatura lingvo kaj la angla lingvo, matura kiel krevanta figo: inter la genia, sed ankoraŭ nesufiĉe edukita junulo, foje kun neevoluinta gustosento, kaj renoma geniulo, enkorpiginta en si amason da buntaj scioj kun la plena libero de l’ spirito. La libero de l’ spirito. La tuta spirado de la homaro estas en ĉi tiu kombino de la vortoj”. (Postskribo al la rusa eldono de *Lolita*, 1965).

Nabokov (kun la pseŭdonimo V. Sirin) verkis ok romanojn ruse, kaj naŭ romanojn angle post la forlaso de Eŭropo – pli malpli egale. Sed se temas pri rakontoj/noveloj, da tiuj li verkis ĉirkaŭ sesdek ruse kaj nur naŭ angle. Same kiel la romanoj, ankaŭ la prozaĵetoj de Nabokov estas verkitaj en lia propra, nekonfuzebila stilo kun elstara priskribo de la psikologia kaj emocia planoj, kvazaŭ malgravaj detaloj (kiel entomologo, ŝakisto kaj krucvortenigmisto li sciis enmeti kaptilojn en la tekstojn), malfirma limo inter la reala kaj fantazia mondoj, multaj aludoj kaj reminiscencoj, kaj tamen lasanta al la leganto mem kompreni la esencon de la priskribataj eventoj (foje kun kvazaŭa nekompetenteco de la rakontanto).

Elekti ses verkojn el sesdeko estis malfacila tasko. Sed traduki ilin estis eĉ pli malfacile.

Se, laŭ Nabokov, okfoje kandidatigita por la literatura Nobel-premio, la lingvo de Puŝkin, Dostojevskij, Tolstoj, Ĉeĥov kaj Bunin estis ankoraŭ “verda”, kio pri Esperanto? Ni klopodis laŭeble zorge kaj diligente traduki ses rakontojn de Nabokov, bonvolu legi ilin kaj decidi, ĉu nia triopa teamo sukcesis.

Aleksander Korĵenkov

Vladimir Nabokov

LA VORTO

Forportita el la surtera nokto de la inspirplena vento de sonĝo, mi staris sur rando de vojo, sub klara, tute ora ĉielo, en eksterordinara montara lando. Mi sentis, sen rigardi al ili, la brilon, la angulojn kaj facetojn de grandegaj mozaikaj rokoj, kaj blindigajn abismojn, kaj la spegulan rebrilon de multaj lagoj kuŝantaj ie sube, malantaŭ mi. Mia animo estis kaptita de sento de diecaj irizaĵoj, volo kaj alteco: mi sciis, ke mi estas en Paradizo. Sed en mia tera animo nur unu tera penso staris kiel akra flamo – kaj kiel ĵaluze, kiel severe mi gardis ĝin de la spiro de la giganta beleco, kiu ĉirkaŭis min... Ĉi tiu penso, ĉi tiu nuda flamo de sufero, estis la penso pri mia surtera patrujo: nudpieda kaj mizera; ĉe la rando de la montara vojo mi atendis ĉielanojn, kompatemajn kaj lumplenajn, kaj la vento, kiel antaŭsento de miraklo, ludis en miaj haroj, plenigis la interkrutejojn per kristala zumado, skuetis la fabelajn silkojn de arboj florientaj inter la rokoj kaj laŭ la vojo. Longaj herboj suprenrampis laŭ trunkoj kvazaŭ fajraj langoj; grandaj floroj glate defalis de la brilantaj branĉoj kaj, kiel flugantaj tasoj, plenigitaj ĝis la randoj per la suno, glitis en la aero, disblovante travideblajn, konveksajn petalojn; iliaodoro, humida kaj dolĉa, memorigis min pri ĉio plej bona, kion mi spertis en mia vivo.

Subite la vojon, sur kiu mi staris anhelante pro la brilo, plenigis ŝtormo de flugiloj... Amase kreskante el iuj blindigaj dolinoj, venis la atenditaj anĝeloj, angule direktinte supren siajn flugilojn. Ilia paŝado ŝajnis aera, kvazaŭ moviĝado de koloraj nuboj, iliaj travideblaj vizaĝoj estis senmovaj, nur radiantaj okulharoj tremis ravite. Inter ili ŝvebis turkisaj birdoj, eksplodante per feliĉa knabina ridado, kaj saltadis elastaj oranĝaj bestoj kun bizaraj nigraj makuletoj: ili tordiĝis en la aero, senbrue elĵetis siajn atlasajn piedojn, kaptis flugantajn florojn – kaj girante, kaj suprenflugante, kaj kun radiantaj okuloj, kuris preter mi...

Flugiloj, flugiloj, flugiloj! Kiel mi transdonu iliajn kurbojn kaj nuancojn? Ili ĉiuj estis potencaj kaj molaj – rufaj, purpuraj, malhelbluaj, veluraj-nigraj kun fajra polvo sur la rondaj finoj de kurbaj plumoj. Ĉi tiuj krutaj nuboj streĉite staris super la brilantaj ŝultroj de la anĝeloj, kaj unu el ili, en iu mirinda impulso, kvazaŭ nekapabla

reteni sian beatecon, subite, por unu momento, malfermis sian flugilhavan belecon, kaj tio estis kvazaŭ plaŭda ekbrilo de la suno, kvazaŭ la brilado de milionoj da okuloj.

Amasoj da ili preterpasis, rigardante supren. Mi vidis: iliaj okuloj estis jubilaj abismoj, kaj en iliaj okuloj estis la kvietiĝo dum la flugado. Ili pasis en flua irado, superŝutataj per floroj. Floroj dum la flugado verŝis sian malsekan brilon; brilaj glataj bestoj ludis, turniĝante kaj leviĝante; birdoj sonoris beate, ekflugante supren kaj malsupreniĝante. Sed mi, blindigita, tremanta mizerulo, staris sur la rando de la vojo, kaj en mia mizera animo balbutis la sama penso: mi petegu, mi petegu ilin, mi rakontu, ho, mi rakontu, ke sur la plej bela Dia astro estas lando – mia lando, – mortanta en pezaj turmentoj. Mi sentis, ke se mi kaptus per mia mano almenaŭ unu tremantan rebrilon, mi alportus al mia lando ĝojon, pro kiu la homaj animoj tuj lumiĝus, turniĝus sub la plaŭdoj kaj krakoj de la renaskiĝinta printempo, sub la ora tondro de la vekiĝintaj temploj...

Kaj, etendinte miajn tremantajn brakojn, provante bloki la vojon al la anĝeloj, mi komencis kapti la randojn de iliaj helaj ornatoj, la ondecajn, varmajn franĝojn de iliaj kurbaj plumoj, glitantaj tra miaj fingroj kiel lanugaj floroj. Mi ĝemis, mi ĵetiĝadis, mi freneze petegis almozon, sed la anĝeloj daŭre iris antaŭen, ne rimarkante min, turnante alten siajn ĉizitajn vizaĝojn. Amasoj da ili impetis al paradiza festo, al neelteneble brila spaco, kie kirliĝis kaj spiris Diaĵo: mi ne kuraĝis pensi pri li. Mi vidis fajrajn araneajojn, ŝprucojn, ornamaĵojn sur la gigantaj, skarlataj, rufaj, violaj flugiloj – kaj super mi pasis ondoj de lanuga susurado, senorde flugis turkisaj birdoj kun ĉielarkaj kronoj, flosis floroj, deŝiriĝante de brilaj branĉoj... “Haltu, aŭskultu min”, – mi kriis, provante brakumi la malpezajn anĝelajn krurojn, sed iliaj piedoj – nesenseblaj, nehaltigeblaj – glitis tra miaj etenditaj brakoj, kaj la randoj de iliaj larĝaj flugiloj, vente flugantaj preter mi, nur bruligis miajn lipojn. Kaj en malproksimo la ora spaco inter la pitoreske kaj klare kolorigitaj rokoj pleniĝis per ilia plaŭdanta ŝtormo; ili estis forirantaj, forirantaj, mallaŭtiĝis kaj ĉesis la alta ekscitita ridado de la paradizaj birdoj, la floroj ne plu flugis de la arboj: mi malfortiĝis, silentiĝis...

Kaj tiam okazis miraklo: unu el la lastaj anĝeloj postiĝis, returnis sin kaj milde proksimiĝis al mi. Mi ekvidis liajn profundajn, fikse rigardantajn, diamantajn okulojn sub la impetaj arkoj de la brovoj. Sur la ripoj de la etenditaj flugiloj, io briletis kvazaŭ prujno, kaj la flugiloj mem estis grizaj, kun nepriskribebla griza nuanco, kaj ĉiu plumo finiĝis per arĝenta krescento. Lia vizaĝo, la konturo de liaj iomete ridetantaj lipoj kaj de la rekta, pura frunto memorigis min pri la trajtoj viditaj sur la tero. Ŝajnis, ke la kurboj, radioj kaj ĉarmo de ĉiuj vizaĝoj, kiujn mi amis – la trajtoj de homoj, kiuj delonge forlasis min – kunfandiĝis en ununura mirinda vizaĝo. Ŝajnis, ke ĉiuj tiuj konataj sonoj, kiuj aparte tuŝis miajn orelojn, nun estis enmetitaj en ununuran perfektan kantaĵon.

Li venis al mi, li ridetis, mi ne povis rigardi al li. Sed, rigardinte al liaj kruroj, mi rimarkis sur lia piedo reton de bluaj vejnoj kaj palan nevuson – kaj pro ĉi tiuj vejnoj,

kaj pro ĉi tiu makuleto, mi konstatis, ke li ankoraŭ ne tute forturnis sin de la tero, kaj ke li povus kompreni mian preĝon.

Kaj tiam, klininte la kapon, preminte miajn bruligitajn, malpurigitajn per hela arĝilo manplatojn al miaj blindigitaj okuloj, mi komencis mian funebran rakonton. Mi volis klarigi, kiel bela estas mia lando kaj kiel terura estas ĝia nigra svenado, sed mi ne povis trovi la ĝustajn vortojn. Rapidante kaj ripetante, mi balbutis pri iuj bagateloj, pri iu bruligita domo, kie iam la sunplena glaceo de la planktabuloj reflektiĝis en klinita spegulo, pri malnovaj libroj kaj malnovaj tilioj, pri artaĵetoj, pri miaj unuaj poemoj en lernejana kajero kun kobaltkolora kovrilo, pri iu griza rulŝtono kovrita de sovaĝaj framboj en la mezo de kampo plena de skabiozoj kaj lekantoj, sed la plej gravan aferon mi neniel povis esprimi – mi konfuziĝis, abrupte eksilentis kaj rekomencis, kaj denove kun senhelpa rapidparolo rakontis pri ĉambroj en malvarmeta kaj sonora bieno, pri tilioj, pri la unua amo, pri burdoj dormantaj sur skabiozoj... Ŝajnis al mi, ke mi tuj atingos la plej gravan aferon, klarigos la tutan malfeliĉon de mia patrujo, sed ial mi povis rememori nur malgrandajn aferojn, tute surterajn, kiuj povis nek paroli nek plori per tiuj grandaj, brulantaj, teruraj larmoj, pri kiuj mi volis kaj ne povis rakonti...

Mi eksilentis, levis la kapon. La anĝelo kun kvietata atenta rideto fikse rigardis al mi per siaj oblongaj diamantaj okuloj – kaj mi eksentis, ke li komprenas ĉion...

– Pardonu min, – mi ekkriis, timide kisante la nevuson sur lia hela piedo, – pardonu, ke mi scias paroli pri aferoj efemeraj, pri malgrandaj. Sed vi ja komprenas... Kompatema, griza anĝelo, respondu al mi, helpu min, diru al mi, kio savos mian landon?

Kaj dum momento, brakumante miajn ŝultrojn per siaj kolombecaj flugiloj, la anĝelo eldiris unu solan vorton, kaj en lia voĉo mi rekonis ĉiujn miajn amatajn, ĉiujn eksilentajn voĉojn. La vorto, kiun li diris, estis tiel superba, ke mi kun suspiro fermis la okulojn kaj ankoraŭ pli forte klinis mian kapon. Ĝi kun bonodoro kaj sonoro trafluis ĉiujn miajn vejnojn, kiel suno leviĝis en mia cerbo – kaj la sennombraj fendoj de mia konscio rekaptis kaj ripetis la paradizan brilantan sonon. Ĝi plenigis min, kiel delikata nodo ĝi pulsas en miaj tempioj, ĝia humido tremis sur miaj okulharoj, ĝia dolĉa frosto trablovis miajn harojn, ĝia ĉiela ardo ĉirkaŭis mian koron.

Mi elkriis ĝin, ĝuante ĉiun ĝian silabon, mi impete levis miajn okulojn kovritajn de radiantaj irizoj de feliĉaj larmoj...

Ho, sinjoro! Vintra mateniĝo verdas en la fenestro, sed mi ne memoras, kion mi kriis...

Tradukis **Vladimir Vyĉegjanin**

Ĝi estas demonstra versio de la 144-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Neforgesebla

de Paulo Sérgio Viana



Jen mi sidas antaŭ la ŝranko de Lea, kaj mi havas en la mano muzikan diskon. Ĝi estas malnova kompakto-disko de Nat King Cole, kiu aperas ridetante sur la kovrilo, sub la terura titolo de la fama kanzono: *Unforgettable*. Mi rigardas ĝin kaj eksentas pikon de angoro.

Neforgesebla. Neforgesebla. Ja neforgesebla estas Lea en mi.

Ŝi mortis antaŭ precize unu jaro. Mi decidis atendi 365 tagojn, ĝis mi akiros kuraĝon tuŝi ŝiajn objektojn en ŝia sekreta ŝranko. Ŝajnis, ke mi tuŝos ion sanktan. Post kvardekjara geedza vivo, ŝi konservis sian sekretan angulon, siajn misterajn tirkestojn, plenajn de paperoj, folioj, fotoj, poŝtkartoj, miniaturoj, leteroj. Ŝi nomis ilin “miaj kaŝitaj trezoroj” kaj permesis al neni aliron al ili. Fakte mi neniam tre scivolis pri tiuj malnovaĵoj ŝimantaj en mallumo. Sed de tempo al tempo ŝi montris al mi foton de unu el niaj infanoj, de antaŭ jardekoj; aŭ poemeton, kiun mi verkis por ŝi, pri kiu mi estis tute forgesinta; aŭ petalon konservitan el unu el niaj multaj vojaĝoj...

Mi estas nun 70-jara malgajulo. Post longa geedza vivo kun Lea, ŝi subite decidis forlasi min kaj veturi al la eterno. Ŝi havis siajn motivojn: ŝia vertebraro tiagrade maljuniĝis, ke ŝi sentis konstantan, turmentan lumbodoloron kaj apenaŭ povis paŝi kelkajn metrojn. Ŝia ĉiama, neskuebla optimismo pri la vivo, ŝia milda rideto, ŝiaj helaj okuloj forperdis sian lumon. Lea ŝrumpis kun la sento, ke ŝi tamen ne rajtas fari tion. Ŝi sentis, ke vivi sen ĝojo estas granda peko...

Ŝi do decidis submetiĝi al operacio, por almenaŭ mildigi la misfunkciadon de siaj vertebro. “Estas iom da risko”, – avertis la kirurgiisto. “La vivo estas risko”, – ŝi ridetante respondis. Kaj ŝi eniris la operacian ĉambron de la hospitalo kun ĉarma juneca rido kaj adiaŭo: “Mi amas vin!”. Ĉi tiu estis ŝia lasta frazo al mi, kiu ankoraŭ hodiaŭ sonas tute klare en mia kapo.

Ĝi estas demonstra versio de la 144-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Nuntempa hispana poezio verkata de virinoj (3)

de Miguel Fernández

La du poetinoj, kiujn mi prezentas ĉi-numere, Isabel Miguel kaj María Luisa García-Ochoa, diversfakaj kunlaboras ĉe la madrida eldonejo *Editorial Lastura*. Kun ĉi tiu mi kontaktis en 2013, kadre de ĝia eldono de la dulingva (hispana-esperanta) poemaro *Vamos, vemos / Ni iras, vidas* de la poetino María Ángeles Maeso, unu el la ĉefaj figuroj de la grupo de la t. n. “poetoj pri la kritika konscienco”. La esperantigon de la poemoj en la libro, samkiel la ambaŭlingvan prologon pri tiu eldono, mi havis la honoron realigi. Tio ebligis min konatiĝi kaj amikiĝi kun pli da tiuskolaj interesaj membroj, inter ili la du poetinoj, kiujn mi prezentas al vi, legantoj de *La Ondo*, ĉi-numere.

Isabel Miguel

Petite pri sinprezento por la legantoj de *La Ondo de Esperanto*, la poetino Isabel Miguel sendis al mi hispanlingvan noton, kies enhavo, en mia esperantigo, jenas:

“La poetino kaj tradukistino Isabel Miguel, naskiĝinta en la Kastilia urbo Soria, loĝas en Madrido. Ŝi direktis kaj/aŭ kunordigis diversajn literaturajn revuojn, samkiel babilrondojn kaj grupojn.


Ŝiaj poemoj kaj tradukoj estis publikigitaj en multnombraj revuoj tiel tutnaciaj kiel internaciaj kaj en pli ol kvindeko da antologioj tiel enlandaj kiel eksterlandaj. La eldonejo *Los libros de Umsalua* publikigis ŝian poemaron *Desvanes mínimos* [Minimumaj mansardoj] (Sevilla, 2011), kaj la eldonejo *Editorial Lastura* publikigis ŝian poemaron *Desvanes mínimos / Sobrados mínimos* [Minimumaj mansardoj / Minimumaj subtegmentoj] (2013).

Poemoj de Isabel Miguel estis tradukitaj en la lingvojn francan, anglan, bulgaran, italan, rumanan, galegan, katalunan, portugalan, ĉinan kaj araban. Ŝi partoprenis



Kronikisto de ĉiutaga metafiziko

Jon Fosse estas blanka, ne tro juna, cis-genera eŭropa viro, do la malo de diverseco en la okuloj de iuj alternativuloj. Tamen la Sveda Akademio bone decidis, kiam ĝi atribuis la ĉi-jaran Nobel-Premion por literaturo al li. Kial? Ĉar li estas bona verkisto. Kaj li estas la unua laŭreato, kiu verkas en la novnorvega lingvo.



Fosse verkis dramojn, romanojn, eseojn, poemojn kaj infanlibrojn. Liaj teatraĵoj estis tutmondaj sukcesoj kaj diskonigis lian nomon al vasta publiko. Multajn jarojn li hastis tra la mondo de unu premiero al la alia. Tiam Fosse vivis sur la rapida trako de la vivo kun alkoholo kiel plia akcelilo, kvankam li estas esence sindetenema persono. Iam, ĉirkaŭ la jaro 2012 ĉio fariĝis tro. Li ĉesis verki dramojn (por eviti invitojn al premieroj) kaj returnis sin denove al prozo.

Kiamaniere li fariĝis verkisto? Kiel infano li havis preskaŭmortan sperton. Tio estis grava momento en la vivo de Fosse. Li ne kapablis rakonti al aliaj pri la okazaĵo kaj tial klopodis skribi pri ĝi.

Estis eble la kvara horo, kiam Trygve kaj mi eliras al la malnova garbejo. Mia avo konstruis tiun garbejon sed nun ĝi disfalas, la nefarbitaj tabuloj de la muro forputriĝas, estas truoj en la muro, oni povas trarigardi kelkloke, kaj iuj tegmentaj tegoloj kuŝas en la urtikoj, pliaj tri estas elstarantaj el kotflako. Rusta najlo pendas de pordkadro. La pordo ankaŭ pendas de la pordkadro, fiksita per drato por fojnpakado, kurbe svingiĝanta. Varma somera tago, posttagmezo. Trygve kaj mi sidas sur ronda ŝtono, kelkajn metrojn for de la garbejo. Sub niaj kruroj estas plastaj sakoj kun nia tagmanĝo, pantranĉaĵoj kun bruna fromaĝo, ni havas unu refreŝigan trinkaĵon. Estas varmege. Ni ambaŭ ŝvitas. Moskitoj zumas ĉirkaŭ niaj kapoj.

Ĉi tiel komenciĝas la *Prozo de infanaĝo*. Fosse ne estas verkisto, kiu elpensas spirhaltigajn intrigojn. La legantoj, kiuj sekvas la stilon de Fosse, observas, ke ili

malakcelas la legadon. Lia stilo estas minimalisma, ripetema. Por Fosse verki estas kiel preĝi. Legantoj, kiuj ne volas preĝi kun Fosse, povas uzi la vorton mediti.


Jon Fosse ja estas religia homo. Dum multaj jaroj li estis kvakero, ĉar la sendogma aliro al la temoj de religio plaĉis al li. Post la persona krizo en 2012, li anstataŭigis alkoholismon per katolikismo, tamen liaj verkoj ne estas propaganda literaturo por iu religio. Fosse skribas pri temoj de la ekzisto: naskiĝo, vivo, morto.

Tiuj temoj tuŝas ĉiun homon, sed ne estas definitiva respondo. Tial la komitato de la Sveda Akademio diris, ke li donas “voĉon al la nedirebla”. La verkaro de Fosse estos valida trans la tempo.

Fosse estis laŭdire jam dum pli ol dek jaroj kandidato por tiu premio. En 2019 norvega ĵurnalisto demandis, ĉu li preferus esti romkatolika sanktulo aŭ ricevonto de Nobel Premio. Tiam Fosse respondis, ke estas longa vojo por fariĝi katolika sanktulo. Almenaŭ li atingis la alian celon.

Wolfgang Kirschstein

Aperis Belarta Rikolto 2023



Ĉiujare la novjorka eldonejo *Mondial* kunlabore kun UEA aperigas la libroforman kajeron *Belarta Rikolto*, enhavantan ĉiujn premiitajn verkojn de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio kaj raporton de la Prezidanto de la Belartaj Konkursoj.

La *Belarta Rikolto 2023* do enhavas poeziaĵojn, prozaĵojn, mikronovelojn, teatraĵon, monologon/skeĉon, eseojn kaj kantotekstojn. La ĉi-jaraj aŭtoroj estas Nicolino Rossi, Evgenij Georgiev, Jouko Lindstedt, Jorge Rafael Nogueiras, Tobiasz Kubisiowski, Carlo Minnaja, Ewa Barbara Grochowska, Christian Rivière, Laure Patas d'Illiers, Debra Hamel, Anastasia Bausk, Francisco Javier Moleón, Raffaele Del Re, Amir Naor, Brandon Sowers, Tomas Frejarö, Serge Sire kaj Antonio Valén. Aldone aperas la raporto de la Prezidanto de la Belartaj, Miguel Fernández.

La libro akireblas i.a. pere de la Libroservo de UEA kontraŭ nur €11,40. Mendu ĉe <https://katalogo.uea.org/?inf=8029>.

La eldona kunlaboro de UEA kun *Mondial* okazas ekde la jaro 2013. UEA regrotulas ĉiujn gajnintojn kaj invitas ĉiujn esperantistojn subteni la kulturon en Esperanto kaj aliri la plej nuntempan literaturan produktadon en nia lingvo per aĉeto kaj legado de la *Belarta Rikolto 2023*.

GK UEA

EAB: 14 novaj libroj en 2023



2023 montriĝis plia aktiva jaro rilate la eldonagadon por Esperanto-Asocio de Britio. Entute EAB eldonis 14 librojn: miksaĵon de ĝiaj kutimaj infanlibroj kaj de libroj por legantoj pli spertaj kaj aĝaj.

La jaro komenciĝis per traduk-konkursoj lanĉitaj en la antaŭjara Zamenhof-tago, kaj malfermaj al esperantistoj ĉie en la mondo. La premioj estis pli ol la ofte simbolaj por tiaj konkursoj: estonta eldonado de la libro, kaj £500 (ĉ. 580 €) kiel dankmono poste.

La ĉefa konkurso celis traduki la unuan kaj trian ĉapitrojn de klasikaĵo de la anglalingva literaturo, *Rebecca* de Daphne du Maurier. Gajnis Malcolm Jones, kiu nun tradukas la restantajn ĉapitrojn. La dua konkurso nomiĝis *Nova talento*, kaj celis bonvenigi homojn ne tiel spertajn, kiujn eblis gvidi poste. Gajnis tion Tobiasz Kubisiowski de Pollando, tradukinte *Matildan* de Roald Dahl. Li jam provizis EAB per la unua malneto: la libro eldoniĝos en 2024.

Ĝi estas demonstra versio de la 144-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Kukoj kun fromaĝ': La kvara Esperanto-albumo de ĴeLe

Kukoj kun fromaĝ' estas la kvara Esperanto-albumo de la ukraina-germana familia duopo ĴeLe (Ĵenja kaj Lena Wilke). Ĵenja estas la filino kaj Lena la patrino, ambaŭ estas muzikistinoj. Ĉi tiu albumo kun 11 ukrainaj popolkantoj en Esperanto aperis en 2017 sur KD. La 24an de oktobro 2023 ĝi aperis ĉe Vinilkosmo kiel bitalbumo.

Pli detale pri la albumo:

Tekstoj kaj muziko: tradiciaj ukrainaj

Tradukoj-adaptoj: Lena Wilke, krom: "Verda folieto": Petro Ŝtabaljuk, "Kukoj kun fromaĝ'": Andreo Rogov (la lasta strofo: Lena Wilke), "Bonvesperon al vi": nekonata adaptisto, "Ho, Ukrainio!": teksto de Lena Wilke.

Ĵenja: kantado, violono, akustika gitaro, ukulelo

Lena: kantado, piano, akustika gitaro, basdrumo, blovharmoniko

Tom Schmeichel: trumpeto, kantado

Mike Hesche: basgitaro

Registrado kaj miksado: Studio de la Muzika Arto-Lernejo de Schwedt (Germanio)

Soninĝeniero: Mike Hesche

Muzikproduktisto: Dieter Wilke

Foto por la kovrilo: ĴeLe

Kovrilgrafikaĵo: Dieter Wilke

Kukoj kun fromaĝ' reaperis laŭ la kutimaj bit-formatoj disponeblaj ĉe Vinilkosmo: <https://mallonge.net/muziko2>.



Flo / AIKO

Primitiva 2: Nova albumo de YASS

YASS (Hugo Yass, aŭ Yas Kawamura) estas japana brunerkantisto el Kioto kun silkeca kaj flustra voĉo. Li akompanas sian kantadon per akustika gitaro kaj ofte koncertas en kafejoj aŭ noktoklubo laŭ la kruvera stilo surbaze de bosanova muziko. Li trovas tiun stilon efika kaj opinias, ke ĝi bone kongruas kun la ritmo kaj kun la tono de lia voĉo.

Kvankam li faris sian unuan koncerton en Esperanto en 1995 dum la somera kurso de SFŜU (Usono), lia unua bitalbumo en Esperanto *Primitiva* aperis nur en 2023. Ĝin baldaŭ sekvis nova bitalbumo *Primitiva 2*, kiu, same kiel la unua, enhavas dek kanzonojn.



La suma daŭro de *Primitiva 2* estas 57 minutoj.

La nova albumo de YASS estas disponebla en pluraj muzikplatformoj elsend-flue, ekzemple: <https://nodee.net/a/z8hmiuxy> <https://www.youtube.com/channel/UCySb7yM7vPlns3P1D8kIL3g> k. a.

Flo / AIKO

La junularo de hodiaŭ: *La Mondanoj revenas!*

La 15an de decembro, je la Zamenhofa Tago 2023, estis oficiale lanĉita la unuopaĵo *La junularo de hodiaŭ de La Mondanoj*. Per tio la Esperanto-rokbando *La Mondanoj* el Berlino, kiu fondiĝis en 1983, post longa paŭzo revenas al Esperanto.

La dutitola unuopaĵo (la kanto kaj la instrumenta versio) estas akirebla ekde nun elŝute en la muzika platformo de *Vinilkosmo* ĉi tie <https://mallonge.net/188> kaj en ĉiuj kutimaj elsendofluaj platformoj.

La kanto *La junularo de hodiaŭ* estis verkita en 1985. *La Mondanoj* ofte ludis ĝin en siaj koncertoj. En 2023 la kanto ricevis kelkajn novajn tekstajn fragmentojn kaj pli altnivelan aranĝon. Ĝi kombinas rokan rifon kun bela gitarludado kaj alloga koruso. *La junularo de hodiaŭ* estas “orelvermo”, kiun vi ne povas ĉesi ludi en via kapo. La teksto ŝajnas moki la hodiaŭan junularon kiel nerdan kaj enuigan, sed ĉi tio estas nur ironia. Fakte *La Mondanoj* amas la nunajn gejunulojn.

En tiu ĉi unuopaĵo *La Mondanoj* estas:

Aaron Koenig kaj Carsten Kindermann: teksto kaj muziko

Aaron Koenig: ĉefvoĉo kaj ritmogitaro

Carsten Kindermann: korusoj kaj basgitaro

Tom Wunderlich: korusoj kaj ĉefgitaro

E-drumo, registrado, kaj miksado: Uwe Häusler en la studio “Electric Ueland”, Berlino, Germanio.

Mastrigado: Triboulet en Studio de la Trappe, Donneville, Okcitanio/SudFrancio
Kovrilbildo: Aaron Koenig

Spektu la varbvideon de *La junularo de hodiaŭ* ĉe

https://youtu.be/71xrHj_bZNs?si=QSDcIY2FGuRytt37

La Berlina bando krome preparis videon por klarigi la signifon de tiu ĉi malnova kanto reverkita por *la hodiaŭa junularo*:

<https://youtu.be/ASJSJqEfqh8?si=ll0fkXhuHyQU4M3P>

Floréal Martorell

Ĝi estas demonstra versio de la 144-paĝa decembra *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>

Mozaiko



La redakcio de “La Ondo de Esperanto” deziras al ĉiuj
abonantoj kaj kunlaborantoj, kaj al iliaj proksimuloj, gajan
Kristnaskon kaj bonan jaron 2024!

(Publika foto de Adobe)

Ho, tiuj komputistoj

Ferianta komputisto ricevis SMS kun urĝa peto: “Ni bezonas reŝalti la servilon, sed neniuj memoras la pasvorton”. Post kelkaj minutoj venas respondo: “Mi estas ĉirkaŭita de idiotoj. Per majusklaĵ literoj, sen spacetoj”.

Oni demandas komputiston kial li elektis tiel strangan pasvorton – “malĝusta”? Li respondas: “Ĉar ne eblas ĝin perdi! Eĉ se mi forgesas ĝin, la komputilo memorigas: via pasvorto estas malĝusta”.

Sperta programisto kreas programojn kiuj ne havas erarojn. Saĝa programisto kreas programojn, kapablajn funkcii malgraŭ ĉiuj eraroj.

Komputisto plendas al sia amiko:

- Vi ne imagas kiel malfacila estas la vivo de la komputistoj! Mi renkontiĝas kun iuj ajn homoj, kaj ili tuj montras al mi sian komputilon kaj petas solvi ĝiajn problemojn.

- Ho, vi ankoraŭ ne imagas kiel malfacila estas vivo de ni, proktologoj, – respondis la amiko.

Oni demandis komputiston, kiel eblas rapide riĉiĝi en Interreto. Li respondis: “Sendu al mi mil dolarojn”. La demandinto plenumis kaj ricevis sekvan respondon: “Nun vi scias kiel”.

Edzino demandas la edzon-komputiston kial iliaj infanoj ĉiam kverelas. Li respondas trankvile: “Banala afero – konflikto de la versioj”.

Maljuna ĉefo telefonas al komputisto: “Sendu al mi tiun dokumenton per faksilo” – “Kie mi estas nun ne plu haveblas la faksiloj” – “Sed kie vi estas?” – “En la jaro 2023”.

- Ĉu vi ŝanĝis la pasvorton de Wi-Fi? – komputisto demandas sian edzinon.
- Jes, nun ĝi estas tre simpla – la dato de nia geedziĝo.
- Damne...

Oni demandas komputiston kiel li sukcesis rapide lerni la anglan lingvon. Li nur svingas la manon:

- Tio estis tre facila – preskaŭ ĉiuj vortoj de la angla estas pruntitaj el C++

Plukis kaj tradukis **Stano Belov**

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Tempvojaĝo al Afriko

La afrika budo ĉe la akceptejo kaj enirejo ofertis diversajn memoraĵojn pri la venontjara UK. (Jukka Pietiläinen: *Relative malgranda, sed bona kaj bonetosa UK en Torino*, sezonoj.ru/2023/09/torino-33)

De loko flugis ni al loko

La distanco estis iom longa, sed rapide esperantistoj lernis la plej rektan vojon tra la konstruaĵo kaj super unu strato. (Samloke)

Trejniĝu al grupsekso

Jam ekpreparu vin al la unua Arfika UK, okazonta venontjare... (*La Ondo de Esperanto*, 2023, №3, p. 5; legis Yves Nevelsteen)

Sekcu urson en Esp-evento!

La eksurso kostas 15 Euj (tiele) kaj inkludas eniron, gvidadon kaj kafon kaj kukon. (esperanto.de/eo/enhavo/ekskursoj-5, stato 3 dec 2023)

Aĉe miniaturoj, aŭ: ĉu eblas pli fie?

Rezultis ŝrumpo de vendoj de la libroservo, kio negative influas la financojn de UEA. (Osmo Buller: *La revuo sen redakto*, liberafolio.org/2023/11/28/la-re-vuo-sen-redakto, stato 28 nov. 2023)

Portretoj por treto?

La movo de la Kongresa Fakto de Roterdamo al Slovakio ne signifas, ke UEA rezignis pri la UK-oj, nur ke ĝi akiris novajn laborfotojn por la UK en Slovakio. (Plej Oftaj Demandoj (POD): Kial oni alvenis al la alternativo vendi la nunan oficejan domon de Universala Esperanto-Asocio?, <https://mallonge.net/18g>, 18 jan.2022; rimarkis Francisco Javier Moleón)

Politeismo

Diobla datreveno de f-ino Vermaas (groups.io/g/uea-membroj/topic/85819101; rimarkis Nicola Ruggiero)

Pli longaj jaroj helpas pri malfruo

Karina Oliveira ... estas longjara esperantisto. La Estraro plene fidis ke ŝi ... helpas [Kontakton] reveni al pli stabila aperritmo. (tejo.org/nova-redaktoro-kontakto; rimarkis Kalle Kniivilä)

Genroŝanĝo ne gravedas

Fine Aleksej decidis edziniĝi, kaj ĉiukaze Nataŝa estis jam videble graveda. (Trevor Steele: *La sangoruĝa flago*. Antverpeno: FEL, 2020, p. 28; trovis Laurent Ramette)

Plukis **István Ertl**

Belgio: Flandra Esperanto-Ligo, Lange Beeldekensstraat 169, BE-2060 Antwerpen. Rete: retbutiko@fel.esperanto.be.

Britio: EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Rete: eab@esperanto.org.uk.

Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301, BR-70393-902 Brasília-DF, CEP 70.393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.

Bulgario: Georgi Mihalkov, «Nadejda» V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia. Rete: modest@abv.bg.

Ĉeĥio: Pavel Polnický, Lidická 939/11, CZ-29001 Poděbrady III. Rete: polnickypavel@seznam.cz.

Ĉinio: Zhang Yan, Linyi shi, lanshan qu, taihe huayuan, CN-276000, Shandong sheng. Rete: 122309267@qq.com.

Estonio: Ahto Siimson, Kastani väikekoht 12-11, Paikuse, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.

Finnlando: EAF / Paula Niinikorpi. Rete: paula.niinikorpi@gmail.com.

Francio: Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris. Rete: info@esperanto-france.org.

Germanio: Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse 9, DE-55129 Mainz. Rete: abono@esperanto-buecher.de.

Hungario: Hungaria Esperanto-Asocio, HU-1146 Budapest, Thököly út 58-60. Rete: hungario@gmail.com.

Hungario: Eszperantó Alapítvány, Leiningen u. 4, HU-1193 Budapest. Rete: szilvasi@eszperanto.hu.

Italio: Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano. Rete: feisegreteria@esperanto.it.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku Waseda-mati 12-3, Tōkyō-to 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.

Katalunio: Sandra Vives Gomez, c/ Bonestar 64 3-3, 08940 Cornellà de Llobregat, (Barcelono). Rete: sandra@esperanto.cat.

Litovio: Litova Esperanto-Asocio, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C. Rete: litova.ea@mail.lt.

Norvegio: Esperanto-Oslo, Morenefarefaret 8 A, NO-4340 Bryne. Rete: oficejo@esperanto.no.

Nov-Zelando: David Ryan, PO Box 3867, Wellington, NZ-6140. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.

Ruslando: Галина Романовна Горецкая, 236039, Калининград, Старопрегольская наб., 10-13. Rete: laondodeesperanto@gmail.com.

Ĝi estas demonstra versio de la 144-paĝa decembra Ondo. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn.

Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:

<https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm>